

人民中國報道

El Populo Cínico

Nov. 1952

11



Alvoko al la Popoloj Tutmondaj

de la Packonferenco de la Azia kaj Pacifika Regionoj

En la Packonferenco de la Azia kaj Pacifika Regionoj, ni, la 367 delegitoj el 37 landoj, kunvenas en amika kaj reciproke konfida atmosfero. Ni apartenas al diversaj nacioj kaj rasoj kaj havas diversajn religiajn kredojn kaj politikajn vidpunktojn, sed ni reprezentas la firman volon por paco de 1,600,000,000 popolanoj. Ni unuanime opinias, ke la batalo por kaj defendo de paco estas urĝa tasko kiu nepre devas esti, kaj povas esti plenumita per komuna klopodo.

En Koreio, la kruela milito jam daŭras pli ol du jarojn. Tie bakteriaj armiloj, napalmbomboj, sencelaj bombadoj kaj aliaj rimedoj por grandskala masakro estas aplikataj senskrupule. Pacaj urboj kaj vilaĝoj forbruliĝis kaj ruiniĝis kaj senkulpaĝaj gevoj kaj infanoj suferas de teruraj perfortaĵoj. Tiu milito jam forrabis la vivon kaj feliĉon de sennombraj homoj. La Usona registaro rifuzas resendi patrolanden la ĉinajn kaj koreajn militkaptitojn laŭ la principoj de internacia leĝo, kaj tiel malhelpas la efektiviĝon de la armistico en Koreio. La Milita Komandejo de Usono foje kaj refoje rompadas la armistican intertraktadon, militas per kontraŭleĝaj rimedoj, kaj agresas la suverenecon de Ĉinio: ĉio ĉi tio estas provokaj agoj riskantaj disvastigon de la milito.

Samtempe, en Vietnamo, Malajo kaj aliaj landoj ankoraŭ daŭras la perarmilaj intervenoj celantaj subpremi la deziron por libereco de la popoloj.

Por fari Japanion milita bazo por entrepreno de nova milito kontraŭ la Azia kaj Pacifika regionoj, la Usona registaro revivigas la japanan militarismen, malobservante la solenajn konvenciojn internaciajn. Tio estas revivigi la militan demonon por tiuj ĉi regionoj.

En multaj landoj de tiuj ĉi regionoj la batalado por nacia liberigo kaj defendo de nacia sendependeco suferas fremdlandajn intervenojn. Pro la perforta starigo de militaj bazoj kaj perforta kontraktado de militaj aliancoj la suvereneco kaj teritoria integreco de multaj landoj estas agresitaj. Forrabataj estas la riĉaĵoj de multaj landoj, kaj iliaj ekonomiaj provizoj estas forprenataj por servi la fremdlandan agresmilitan planon. En tiuj landoj, kiuj estas devigitaj partopreni la movadon de grandskala armea ekspansio kaj militpreparo, la prezaltiĝo kaj inflacio severe influas la vivnivelon de la popoloj. Blokado kaj embargo kaŭzis ankoraŭ pli multajn nenecesajn suferojn kaj denove enhaosis la ekonomion kiu ankoraŭ ne tute restariĝis el sub la influo de la Dua Mondmilito. Kaj en multaj landoj la kulturaj laboroj kaj planoj pri socia plibonigo estas devige stagnigitaj. En multaj lokoj de tiuj ĉi regionoj virinaj rajtoj estas malobservataj kaj la bonvivo de infanoj, neglektata. Por sian militan politikon advokati kaj akceli, oni incitas per trompaj propagandoj internacian malkonfidon, propagandas teorion pri rasa malegaleco kaj fabrikas diversmaniere malharmonion inter la nacioj.

Reliefe kontrastante kun tiu furioza kurado al milito, la popoloj de la tuta mondo sincere aspiras ĉesigi la ekzistantajn konfliktojn, konstrui kaj plibeligi

la vivon per la energio kaj naturprovizoj, kiuj estas uzataj por pereigo de la vivo, kaj garantii al la homaro pacon longdaŭran.

La popoloj ankoraŭ sklavigataj de fremda regado jam komprenas, ke la batalo por nacia liberigo estas nedisigeble kunligita kun la batalo kontraŭ milito, kaj ke la militaj preparoj estas plifortigantaj la ĉenon kiu ilin sklavigas. En la landoj kies registaroj direktas la militajn preparojn, la popoloj vivas en timo kaj ekstrema malsekureco; ili komencas kompreni, ke sekureco kaj stabileco estos akireblaj nur per paca evoluo. Kaj la landoj kiuj havas gigantajn planojn por paca ekonomia konstruado, soife aspiras pacon, por daŭrigi la laboron plialtigi la vivnivelon de la popoloj.

La popoloj de la Azia kaj Pacifika regionoj persistas en sia komuna celado, nome kontraŭbatali militon kaj defendi pacon.

Ni refoje deklaras nian firman konvinkon, ke landoj kun diversaj socisistemoj kaj vivmanieroj povas pace kunekzisti kaj kunlabori en reciproka favoro.

Ni plene komprenas, ke pacon ni ne povas atendi sidante, sed ke ni devas ĝin batalakiri. Por gajni daŭran pacon ni devas unuiĝi kaj energie bataladi.

Por la paco de tiuj ĉi regionoj kaj de la mondo, ni nepre postulas:

Tuj efektiviĝi la korean armisticon sur bazo de justeco kaj racio; fini la militojn en Vietnamo, Malajo kaj aliaj lokoj, kaj de tie retiri ĉiujn armetrupojn fremdlandajn;

Haltigi la revivigon de la japana militarismo; kontrakti veran packontrakton inter Japanio kaj la koncernaj landoj; starigi novan Japanion sendependan, demokratan, liberan kaj pacan;

Kontraŭstari intervenon de unu lando al la interna administrado de alia lando; kontraŭstari agreson de unu lando al la suvereneco de alia lando; defendi kaj efektiviĝi nacian sendependecon;

Kontraŭstari blokadon kaj embargon; akceli sur bazo de egaleco kaj reciproka favoro kulturen interŝanĝon kaj ekonomian kunlaboron inter la landoj;

Malpermesi instigon por milito; kontraŭstari rasan malegalecon; protekti virinajn rajtojn kaj plialtigi la bonvivon de infanoj;

Rapide kontrakti Pacpakton inter la Kvin Potencoj; redukti la armadon kaj malpermesi la uzadon de atomaj, bakteriaj, ĥemiaj kaj aliaj armiloj amasbuĉaj.

En la batalado por defendi la pacon de la Azia kaj Pacifika regionoj kaj de la tuta mondo, la Usona popolo havas speciale grandan respondecon.

La agoj de militado kaj militpreparado fare de la Usona registaro en tiuj ĉi regionoj kaj aliaj partoj de la mondo estas ja grava katastrofo por la popoloj de la Azia kaj Pacifika regionoj kaj la popoloj tutmondaj. Kvankam tiuj agoj estas farataj en la nomo de la Usona popolo, tamen ili konformas nek al la volo, nek al la intereso de la Usona popolo.

Pro tio, la urĝa bezono kaj sankta devo de la Usona popolo estas: surŝultrigi la respondecon haltigi

(daŭrigota sur p. 260)

PACIFIKO FARIGAS PONTO POR UNUIĜO INTER POPOLOJ

*Parolado de s-ro Volodia Teitelboim,
verkisto, ĉefsekretario de la Popola
Fronto en Ĉilio kaj Ĉilia delgito al
la Packonferenco de la Azia kaj Pacifika
Regionoj. La parolado estas farita en
la Pekina popola kunveno celebranta
la sukceson de la Konferenco.*

Ĉinaj amikoj,

Ni venas de tre malproksima loko. Ni estas viaj fratoj sur la alia bordo de la Pacifiko. Ni reprezentas la ardan amon por paco de la popoloj de Latina Ameriko.

En Pekino ni libere kaj demokrate diskutis dum dek tagoj kune kun la Aziaj popoloj pri nia fundamenta tasko nuntempa, t.e. la problemoj kiel konkrete defendi pacan kunekzistadon de la popoloj. Ni scias, ke paco ne estas nur io simbloliganta per kolomboj flugantaj en la aero sed ĝi konsistas el sango kaj karno oferitaj en la batalo por nacia liberigo. Se estas paco, tiam estas pano kaj progreso por ĉiuj bonaj homoj. Kiel reprezentantoj de 1,600,000,000 popolanoj ni vidas ĉi tie ke, ĉiuj popoloj kaj rasoj povas ekzisti kune.

Tiu ĉi konferenco pliriĉigas nian movadon ĉar ĝi donas al ni multe da novaj valoraj spertoj kaj praktikaj rimedoj. Tie ĉi ni pli klare vidas kiel rapide la pac-tendaro disvastiĝas kaj kiel granda estas ĝia forto kompare al tiu de la milit-instigantoj. Per niaj propraj okuloj ni konstatis ke en la mondo troviĝas nenia forto kiu povas detrui la intiman, fratan amikecon inter Sovetunio, la Ĉina Popola Respubliko, la Nov-demokratioj kaj ĉiulandaj popoloj.

Nun la Pac-konferenco de la Azia kaj Pacifika Regionoj baldaŭ finiĝos kaj ni volas diri al ĉiuj niaj amikoj, al la Ĉina Registaro kaj la Ĉina Popola Mondpac-defenda Komitato: En la nomo de la popoloj de ĉiuj niaj landoj ni dankas vin el la profundo de nia koro.

Ni ne volas diri "adiaŭon". Tio kion ni volas diri estas: "Ni sentas ke la Pacifiko nun komencas fariĝi ponto por unuiĝo inter ĉiulandaj popoloj sur siaj ambaŭ bordoj kaj ĝi ne plu estas alta muro starigita de milito kaj koloniismo por nin disigi.—Tio estas tasko kiun la malamikoj de paco kaj la subpremantoj estintaj kaj estantaj devigas nin plenumi."

Plie, tiu ĉi oceano fariĝos eĉ ankoraŭ pli paca kaj pli glora, kiam la rezolucioj de nia konferenco efektiviĝos dank' al la organizado kaj penado de ĉiulandaj popoloj, kiam la paco multe valorata de la popoloj kaj tre utila por konstruado—t.e. atomosfero absolute bezonata de homaraj feliĉo, libereco kaj disvolviĝo de kulturo kaj diversaj artoj—denove realiĝos en Koreio, Vietnamo, Pathat Lao, Kmero kaj Malajo. Tiam la patrinoj,

memorante pri la utiligo de bakteriaj armiloj, ĝin rigardos nur kiel teruran inkubon. Tiam la Usonaj invadantoj ne plu bombardos la nordorientan bordon kaj la neinvadeblajn kampojn de Ĉinio. Tiam la popoloj de ĉiuj landoj jam akiras sian sendependecon. Tiam Japanio jam estos lando libera kaj demokrata kaj ne plu estos kanono en la mano de imperiismo, celanta al la nobla koro de Ĉinio.

Kiam ni vidas sur nia komuna maro sennombrajn ŝipojn kiuj estas ŝarĝitaj per tritiko, maŝinoj, kupro, nitrato, oleo, stano, teo, rizo kaj saĝeco kaj veturas en ĉiujn direktojn, tiu ĉi maro aperos multe pli paca kaj trankvila. Tiam tiuj ŝipoj portos sur si milojn da vojaĝantoj inter kiuj troviĝas laboristoj, artistoj, inĝenieroj, industriistoj kaj terkulturistoj kaj ankaŭ junuloj kaj junulinoj. Ili estos garantio por libera ekonomia kaj kultura interŝanĝo.

Karaj amikoj, baldaŭ ni reiros al nia lando. Ni bedaŭras ke nun ni devas diri adiaŭon al la ĉina popolo tuj post kiam ni konatiĝas kun ili. Sed samtempe ni ankaŭ ĝojas fofiri, ĉar ni jam vidas ilian novan vivon kaj ĉar ni devas reveni al niaj propraj postenoj por plenumi la noblan taskon: antaŭenpuŝi nian batalon por paco en la Amerikaj landoj. Ni intencas sciigi fidele al la popoloj ĉiulandaj ĉion kion ni vidas kaj travivas. Estas sufiĉe se nur ni sciigas al ili la veran staton. Tiu ĉi vera stato estas tiel granda kiel la tero de Ĉinio kaj la koro de ĉina popolo. Ĝi estas sciigo kun grandega signifo. Ni havas la devon ĝin transformi en ideojn kaj agojn de la popol-amasoj.

Post kiam ni revenos, ni certe sciigos al la ordinaraĵaj popolanoj de la Amerika Kontinento: "Aŭskultu, vi, viroj kaj virinoj, kiuj suferas malsaton kaj maljustaĵon kaj revas pri bona vivo! Ni jam vidis tian vivon. Ni jam vidis ke la plej granda popolo en la mondo kiu suferis subpremadon dum miloj da jaroj vivas hodiaŭ liberan kaj sendependan vivon kaj tion ili akiris per sia propra batalado." En Ĉinio aperas nova grandioza tagiĝo. Propraokule ni vidis la grandan konstruadon kiu antaŭenpuŝiĝas en pacaj cirkonstancoj. Antaŭ ĉirkaŭ dek tagoj ni vidis tian grandan ondantan pac-forton sinmontrantan antaŭ Tien-an Men. Propraokule ni atestis tiun nedetruieblan moralan kaj politikan unuiĝon inter la popolo kaj la registaro. Profunde ni estimas tian maturan konscion kaj altgradan organizecon nacie kaj internacie elmontritajn. Ni emociiĝas pro la prizorgado kiun ĝuas viroj, virinoj kaj infanoj.

Ni sciigos al nia popolo ke en iu grava tago en 1949, Prezidanto Maŭ diris: "Nia nacio ne plu estas nacio humiligata. Ni jam stariĝis." Ni klopodos klarigi al ili kiel tiu diro fariĝas fakto.

Jes, ĉie ni vidas ke Ĉinio jam stariĝis kaj antaŭen marŝas. Hodiaŭ ĝi jam estas nacio amata kaj estimata de la tutmondaj popoloj. Ĝi estas lando kiu havas centojn da milionoj de amikoj tra la mondo. Kaj tiu lando estas ekzemplo kaj lumturo por ni sudamerikanoj. Ni sciigos al niaj amikoj malproksimaj sur la alia bordo de la oceano: la ĉina popolo estas ne nur nacio tre

(daŭrigota sur p. 256)

Bakteria Milito Pruvita de Sciencistoj

La Internacia Scienca Komisiono, post du monatoj da ampleksa esplorado, jam plenumis sian laboron kaj certigis ke la armitaj fortoj de Usono faris bakterian militon kontraŭ Koreio kaj Nordorienta Ĉinio.

Tiu ĉi Internacia Scienca Komisiono formiĝis post la Oslo-kunveno de la Plenuma Komitato de la Monda Pac-Konsilo kaj je la invito de Kuo Mo-ĵo, Prezidanto de la Ĉina Scienca Akademio kaj de la Ĉina Popola Komitato por Mondpaco. La membroj de la Komisiono estas:

D-ro Andrea Andreen (Svedio), Direktoro de la Centra Klinika Laboratorio de la Hospitala Departamento de la Urbo de Stokholmo;

S-ro Jean Malterre (Francio), Direktoro de la Laboratorio de Animala Fiziologio, Nacia Kolegio de Agrikulturo, Grignon; iam Besta Specialisto, Helpa kaj Restariga Administracio de la Unuigitaj Nacioj; korespond-membro de la Itala kaj Hispana Societoj de Animala Kulturado;

D-ro Joseph Needham (Britlando), Membro de Reĝa Societo: Lektoro de 'Barono William Dunn' pri Biokemio, Universitato de Cambridge; iam Konsilanto (scienca) de Brita Ambasadorejo, Ĉungking, kaj poste Direktoro de la Sekcio de Natur-sciencoj, Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo de Unuigitaj Nacioj;

D-ro Oliviero Olivo (Italio), Profesoro de Homa Anatomio en la Medicina Fakolo de la Universitato de Bologna; iam Lektoro pri Ĝenerala Biologio, Universitato de Turin;

D-ro Samuel B. Pessoa (Brazilo), Profesoro de Parazitologio en la Universitato de Sao Paulo; iam Direktoro de Publika Sano por la Provinco de Sao Paulo; Honora Profesoro en la Fakultatoj de Medicino de la Universitatoj de Recife kaj Paraiba;


D-ro N. N. Zhukov-Verezhnikov (U.S.S.R.), Profesoro de Bakteriologio en, kaj Vic-prezidanto de la Soveta Akademio de Medicino; iam ĉefa medicina specialisto ĉe la Khabarovsk-a Juĝado de japanaj eks-armeanoj akuzitaj pro partopreno en bakteria milito.

La membroj de la Internacia Scienca Komisiono venis al Pekino je la 21a kaj 28a de junio.

De la 23a de junio ĝis la 9a de julio la Komisiono dediĉis plejparton de sia tempo al preparo por la ĉe-okazeja esplorado. Dum tiu periodo la membroj de la Komisiono zorgeme studis la dokumentojn publikigitajn de ĉina kaj korea flanko kaj faris diskutojn pri la sciencaj problemoj rilate al metodoj de bakteria milito. Je la 10a de julio la Komisiono foriris de Pekino al Mukdeno kie ili pasigis du semajnojn farante ampleksajn esplorojn kaj enketojn pri la faktoj koncerne la bakteriajn militojn fare de la Usonaj armitaj fortoj en Nordorienta Ĉinio.

Je la 26a de julio la Komisiono iris al Koreio kaj revenis al Mukdeno je la 6a de aŭgusto. En Pjongjang la Komisiono zorgeme esploris la bakterian militon fare de Usonaj armitaj fortoj kontraŭ Koreio.

Dum ilia esplor-laboro la Komisiono aŭskultis multajn sciencajn raportojn donitajn de ĉina kaj korea flanko, ekzamenis specimenojn, pridemandis centojn da atestantojn, faris ĉe-okazejan inspektadon kaj klopodis



Jean Malterre, komitatano de I.S.K. zorge rigardas la fotojn de puloj kun pestaj baciloj ĵetitaj de Usonaj aeroplanoj en Hajjang Kuen de Koreio

pri detalaj esploroj kaj intervjuoj. Kelkfoje ili pasigis tutan tagon en laboratorioj kaj iufoje pridiskutis problemojn ĝis profunda nokto. Dum la esplora procedo la Komisiono invitis multajn ĉinajn kaj koreajn sciencistojn fari sciencajn raportojn rilate al bakteria milito fare de la Usonaj armitaj fortoj kaj diskutis kun ili. La membroj de la Komisiono esprimis sian admiron pri la verama sinteno kaj la sciencaj atingoj de ĉinaj kaj koreaj specialistoj.

Dum tiu ĉi periodo la Komisiono, ĉe rendevuo en Nordkoreio, vidis kaptitajn Usonajn aerarmeanojn kiuj konfesis ke ili faligis bakteriajn bombojn.

Tie la Komisiono intervidiĝis ne nur kun K. L. Enoch kaj John Quinn, la du kaptitaj Usonaj aerarmeanoj kies nomoj estis jam vaste konataj al la mondo, sed ankaŭ kun du aliaj antaŭnelonge kaptitaj, Flyod B. O'Neal kaj Paul Kniss. Tie la kvar militkaptitoj provizis la Komisionon per pli detalaj atestoj pri la faligo de bakteriaj bomboj fare de la Usonaj armitaj fortoj.

Post reveno al Pekino je la 9a de aŭgusto, la Internacia Scienca Komisiono komencis verki sian raporton kaj kontroli la apendicojn. Tiu ĉi tasko kompletigis ĉe la fino de aŭgusto. La subskriba ceremonio okazis je la 31a de aŭgusto.

La raporto konsistas el 19 ĉapitroj kaj la apendicoj konsistas el 46 sekcioj, enhavante entute ĉirkaŭ 300,000 vortojn kaj publikigita en kvar lingvoj: franca, angla, rusa kaj ĉina. La antaŭparolo kaj la konkludo de la raporto tekstas jene:

Antaŭparolo

Ekde la komenco de 1952, tre neordinara fenomeno okazinta en la teritorioj de Koreio kaj Ĉinio kondukis al la akuzo flanke de la popoloj kaj registaroj de tiuj landoj ke ili fariĝis la objekto de bakteria milito.

Ĉar la popoloj de la mondo jam delonge elmontris sian malaprobon, kaj ja malŝategon, pri tiaj metodoj

de militado, la seriozeco de la situacio estis bone komprenebla. Tio estis la kaŭzo de la formado de la Internacia Scienca Komisiono kiu devis esplori la atestojn ĉe la okazejo.



La komitatanoj de I.S.K. ekzamenas la tri ferajn bakteriujojn elĵetitajn de Usonaj aeroplanoj en Ĉangpaj-gubernio de Nordorienta Ĉinio je la 26a de marto, 1952 kaj la porcelanan bakterian bombon de la japana militkrimulo Ishii Shiro.

La membroj de la Komisiono kiuj, konsciante sian respondecon, faris ĉiun penon liberigi sin de antaŭ-konceptitaj ideoj, plenumis sian esplor-laboron laŭ la plej rigoraj sciencaj principoj konataj al ili. La detaloj de tiu ĉi laboro kaj la konkludo al kiu ĝi kondukis estas metitaj antaŭ la leganto en tiu ĉi raporto. Ok lingvoj kune partoprenis en la verkado, kaj se ĝi troviĝus mankanta elegantecon, la leganto memoru, ke ĝi devas esti klara, nedubesenca kaj komprenebla en ĉiu kontinento.

Konkludo

Depost la komenco de 1952 tre neordinara fenomeno okazinta en Koreio kaj Ĉinio kondukis al la akuzo flanke de la popoloj kaj registaroj de tiuj landoj ke la Usonaj armitaj fortoj estas farantaj bakterian militon. La Internacia Scienca Komisiono kiu estis starigita por esplori la rilatajn faktojn nun jam finis sian laboron post pli ol du monatoj ĉe la okazejo.

Ĝi trovis antaŭ si amason da faktoj el kiuj iuj formis koherajn specimenojn kiuj pruviĝis treege demonstraj. Tial ĝi siajn penojn koncentrigis precipe sur tiujn faktojn.

La Komisiono venis al la sekvantaj konkludoj. La popoloj de Koreio kaj Ĉinio efektive fariĝis la objekto de bakteriaj armiloj. Tiuj estas uzitaj de unuoj de Usonaj armitaj fortoj per multe da malsamaj metodoj, el kiuj iuj verŝajne estas evoluaĵoj de tiuj aplikitaj de la japana armeo dum la Dua Mondmilito.

La Komisiono faris tiun ĉi konkludon, pasante de unu logika paŝo al alia. Ĝi faris tion ja kontraŭvole, ĉar ĝiaj membroj ne inklinas kredi, ke tia malhumana tekniko povus esti efektivigita kontraŭ la universala kondamnado de la popoloj de ĉiuj nacioj.

Nun estas tempo por ĉiuj popoloj duobligi siajn penojn por savi la mondon el militado kaj malebligi la utiligon de sciencaj eltrovoj por la detruado de la homaro.

Trad. I. K.

Packonferenco Finiĝis Sukcese en Pekino

Post 11-taga laboro kaj akiro de riĉaj rikoltoj, la Packonferenco de la Azia kaj Pacifika Regionoj sukcese fermiĝis je la mateno de 13. okt. en Pekino. La Konferencon partoprenis entute 463 personoj el 45 landoj. El ili troviĝis 367 delegitoj kaj 37 observantoj de 37 landoj, kaj multaj speciale invigitaj gastoj kaj observantoj el 9 internaciaj demokrataj organizoj kaj diversaj landoj. Ekde 2. okt. la Konferenco aŭdis raportojn kaj paroladojn fare de 109 delegitoj, observantoj kaj speciale invigitaj gastoj. Post plene demokratataj diskutadoj en la diversaj komitatoj kaj ĝeneralaj kunsidoj en la lasta ĝenerala kunsido de la konferenco estis unuanime aprobitaj la Alvoko al la Popoloj de la Mondo, Letero al la Unuigitaj Nacioj kaj estis ankaŭ gravaj rezolucioj pri la Korea Problemo, pri la Japana Problemo, pri Problemo de Nacia Sendependeco, pri Kultura Interŝanĝo, pri Ekonomiaj Interrilatoj, pri Virinaj Rajtoj kaj Infana Bonvivo, pri Intensigo de la Kampanjo por la Kontrakto de Pacpako inter la Kvin Potencoj kaj pri Subteno de la Kunvoko de Packongreso de Tutmondaj Popoloj. Por plifortigi la pacmovadon en tiuj ĉi regionoj, en la Konferenco estis unuanime aprobita la decido starigi konstantan kontaktan organizon, la Paca Kontakta Komitato de la Azia kaj Pacifika Regionoj.

Usonaj Imperiistoj Interrompis la Armistican Intertraktadon Korean

La Usonaj imperiistoj jam ekde la komenco havas nenian sinceron en la korea armistica intertraktado. Ili faris serion da provokaj agadoj, malobservante la interkonsenton pri neŭtrala areo, ekz. iliaj aeroplanoj foje kaj refoje flugis super la kunsido, ili bombardis kaj maŝinpafis la konferencan areon, atakis la aŭtojn de Ĉina-Korea Delegacio ktp. Kvankam la Usonaj imperiistoj konstante sin senkulpigadis per senhontaj ruzaj frazoj, tamen antaŭ la nerefuteblaj atestaĵoj kaj faktoj ili ne povis ne konfesi kontraŭvole parton de la krimaj agoj, kaj sole tiu parto atingis jam 18 fojojn ekde 10. sept. 1951 ĝis 8. okt. 1952. En la intertraktado ili adoptis prokrastadon kiel sian strategion, fabrikante multajn malfacilojn en la procedo, ekz. pri la problemo de milita divido-linio, pri la rekomendo de neŭtralaj landoj, ili foje kaj refoje prezentis absurdajn proponojn, por ke la jam interkonsentitaj kondiĉoj ne realiĝu. En la problemo de interŝanĝo de militkaptitoj, la Usonaj imperiistoj intence rompis la Ĝenevan Konvencion, malobservis la internacian tradicion kaj kreas la absurdan t.n. "principon de memvola repatriiĝo" per amasbuĉado kaj perforta "kribrado". Nun kiam la prova interkonsento pri armistico estas atingita dank' al la sincero kaj klopodo de ĉina-korea flanko, kaj por ĝin efektivigi oni bezonas nur plenumadon, la Usonaj imperiistoj tamen denove rifuzis repatriigi la militkaptitojn laŭ la paragrafoj 51a kaj 52a de la interkonsento kaj arbitre deklaris nedefinitan paŭzon al la konferenco tiel fermante la pordon de paca intertraktado. Por tuj ĝin rekomenci Generaloj Peng Teh-huaj kaj Kim Il-sung skribis al Clarke, la Usona ĉefkomandanto je 16. okt. sed la lasta tute senracie kaj obstine tion rifuzis. La intrigo de la Usona flanko intence interrompi la armisticantraktadon estas plene malkovrita.

Plifirmigu la Amikecon inter Ĉinio kaj Sovetunio

Ĉian Zun-ĵuj,

(Ĉef-sekretario de Ĉinia-Sovetia Amikeca Asocio, Tutlanda Komitato.)

La amikeco kaj kunlaboro inter la ĉina kaj Sovetia popoloj estas la plej fidinda gardilo de paco en la Malproksima Oriento kaj la mondo. Prezidanto Maŭ Ze-tung instruis nin: "La fortika alianco de Ĉinio kaj Sovetunio estas nevenkebla forto, firma garantio kontraŭ la agreso de imperiistoj kaj por al defendo de paco kaj sekureco en la Malproksima Oriento, kaj ankaŭ garantio por la venko de la granda laboro por mondopaco." La faktoj dum la pasintaj tri jaroj pruvis tute prava tiun prudentan aserton de Prezidanto Maŭ Ze-tung. La agresaj intrigoj de imperiistoj jam senĉese ricevas pezajn batojn de la gvidata de la granda Sovetunio tutmonda demokrata pactendaro, kies forto, baziĝanta sur la Ĉinia-Sovetia alianco, estas vigle disvolviĝanta kaj kreskanta kaj jam multe superis la forton de la agresata tendaro de la imperiistoj. La Lasttempa Ĉinia-Sovetunia deklaro pri transdono de Ĉina Ĉangĉun-Fervojo al la registaro de Ĉina Popola Respubliko kaj la interŝanĝo de notoj pri plilongigo de la limtempo kune uzi la ĉinan mararmean bazon de Port-Arturo ja estas gravega aranĝo por garantii la pacon en la Malproksima Oriento kaj la mondo. Tiu ĉi fakto forte stimulis la pacamajn popolojn tutmondajn kaj samtempe donis pezan baton al la krima intrigo de la Usonaj imperiistoj kiuj estas en komuna konspiro kun la japanaj imperiistaj fortoj.

Kaj plie, la amikeco kaj kunlaboro inter la ĉina kaj Sovetia popoloj estas grava garantio por la sukceso de la konstruado de nova Ĉinio.

Dum la pasintaj tri jaroj, laŭ la prunta kaj komerca traktato inter Ĉinio kaj Sovetunio la Sovetia registaro donis al nia lando grandkvantan materialan helpon kaj provizis gravajn kondiĉojn materiajn kaj teknikajn por nia ekonomia rekonstruo, precipe por la industriigo de nia lando. Sub la intima zorgo kaj instruado de k-do Stalin, la Sovetia registaro eĉ sendis en nian landon grandamasojn da eminentaj fakuloj, kiuj, en spirito de granda internaciismo, sincere kaj malavare helpas la konstruadon de nova Ĉinio, laborante kune kun nia laboranta popolo. Ili senrezerve disponas al la ĉina popolo la progresajn teknikojn de scienco kaj produktajn spertojn, kulturis por nova Ĉinio grandnombron da konstruaj laborantoj, ŝparis kaj pliiĝis grandkvanton da riĉaĵoj, kaj sekve multe mallongigis la proceson de la konstruaj laboroj de nova Ĉinio.

Ekzemple, flanke de industrio, en Nordoriento pro la vasta apliko de la progresata sperto de Sovetunio "Rapida Ekzameno-riparo", la elektraj organizoj en tiu regiono kreis por la lando riĉaĵojn egalvalorajn al pli ol 8,000 tunoj da grenoj. Sovetiaj fakuloj instruis al niaj laboristoj la metodon de altrapida frezo de la Sovetia maŝinindustrio, kaj tiel plialtigis la laborefikon de la tornmaŝinoj kelkoble aŭ kelkdekoble. La progresata produkta sperto de Sovetunio "Paralela Labormetodo" multe mallongigas la tempon en la konstruado de karbminejaj vertikalaj ŝaftoj en nia lando; pro la vasta apliko de tiu ĉi progresata sperto la Siana Mineja Buroo en la Nordoriento finis la grandskalan konstruadon de vertikalaj putoj je 5 jaroj pli frue. La progresata sperto de Sovetunio "Kovalev-Labormetodo" estas

aplikata en multe da produktaj fakoj kaj ege helpas al la plialtigo de la industria produktado de nia lando. La aplikiĝo de la Sovetia progresata sperto "Organizado de ritma produktado laŭ montraj grafikoj" grave reformis la administran metodon de entreprenoj en nia lando.

La impeta progreso de la fervojaj laboroj de nova Ĉinio dum la pasintaj tri jaroj estas des pli nedisigebla de la helpoj de Sovetiaj fakuloj. Speciale menciinda estas la brila atingajo de Ĉina Ĉangĉun-Fervojo. Dum pli ol du jaroj la Sovetiaj fakuloj de Ĉina Ĉangĉun-Fervojo elkulturis por ni pli ol 16,300 oficistojn kaj laboristojn kapablajn mastri la progresan metodon de entreprena administrado. Ĝis la fino de 1951, la progresaj metodoj de Sovetiaj fervojaj laboroj vaste aplikigitaj nombris pli ol 130 specojn. Ĉar la ĉinaj fervojaj laborantoj lernis la progresajn spertojn de Sovetunio kaj la fervojaj oficistoj kaj laboristoj de Ĉinio kaj Sovetunio kune penis, en 1951 la labora produktado de Ĉina Ĉangĉun-Fervojo pli altiĝis je 27.8% ol en 1950, la elspezoj reduktiĝis ol la antaŭe decidita plano je pli ol 72,300,000,000 janoj (ĉina monunujo), kaj pro la plirapidiĝo de la cirkulado de vagonoj la profito gajnita superis la planon per biliono da janoj. Despli brila ekzemplo de la kunligo de la krea talento de la ĉina laboranta popolo kun la Sovetiaj spertoj de socialisma konstruado estas, la konstruado de Ĉengtu-Ĉunkina Fervojo sur kiu komencis veturi vagonaro ekde la 1-a de julio ĉi-jare. Tia kunligo en mallonga tempo de du jaroj realigis la esperon de pli ol 40 jaroj de la loĝantoj de Seĉuan-provinco. En la konstruado de vojbazoj, pontoj kaj tuneloj ĝis la lokado de reltraboj kaj reloj kaj la fabrikado de ŝtalreloj, oni vaste aplikis la progresajn spertojn de Sovetunio, tiel ke la Ĉengtu-Ĉunkina Fervojo atingis la normon de moderna fervojo.

Flanke de la restarigo kaj disvolvo de nia agrikultura produktado, Sovetiaj fakuloj ankaŭ faris grandajn klopodojn. Ili penegis enkondukis progresajn teoriojn de agronomio kaj spertojn de socialisma agrikultura konstruado kaj konkrete helpis niajn kamparanojn plibonigi agrikulturajn teknikojn kaj manipuli modernajn instrumentojn agrikulturajn. Ili ankaŭ prezentis al ni valorajn spertojn en la reĝustigo kaj disvolvo de nia arbarkulturado. Kaj estas speciale menciinda la varma akcepto de la Sovetiaj registaro kaj popolo al la kamparana delegitaro sendita ĉi-jare de ĉinaj kamparanoj por viziti Sovetunion. La delegitaro, kiu en Sovetunio vizitis multajn sovjetojn, kolĥozojn, staciojn de agrikulturaj maŝinoj kaj gigantajn konstruojn de komunismo, kunportis el Sovetunio multnombrajn proprokule viditajn faktojn kiuj estas la modelo por la agrikulturo de nova Ĉinio kaj sendube puŝos nian vastan kamparanaron al la vojo de kolektivismo kaj riĉa materia kaj kultura vivo.

Ĉi tie, ni ankaŭ devas esprimi specialan dankon al la Sovetia fakulo k-do Bukov kiu faris la por ĉiam neforgeseblan kontribuon en la gigantaj laboroj de Huaj-rivera subjugo kaj la inundakva deteno ĉe King-rivero. Helpe de li ni difinis la konstruan planon por grandskalaj akvokonservejoj kaj inundakva-detenejoj

ĉe la subjugado de Huaj-rivero. En la laboro de inundakva deteno ĉe King-rivero li projektis la konstruon de kluzo sen starigo de fostoj, la fermadon kaj malfermadon de la pordo de la enflukluzo por inundakvo, la faman "Bukov-trogon", k.a.

La laboroj de la Sovetiaj fakuloj kaj la enkonduko de Sovetiaj progresaj spertoj multe influas al la reformo kaj evoluo de la kultura, eduka, scienca kaj sanitara aferoj de nia lando. La tezoj kaj ideoj apartenantaj al la burĝa ideologia sistemo kaj kontraŭantaj la popolan intereson estas severe kritikitaj dum progresintaj sciencaj teorioj kaj teknikoj de Sovetunio estas vaste lernataj kaj akceptataj de la vasta popolo, precipe la intelektuloj de Ĉinio. Ĉe enhavo, sistemo, organizo kaj metodoj la kultura kaj eduka laboroj estas sukcese reformataj surbaze de laŭpaŝa kunligo de lerno de Sovetiaj progresaj spertoj kun la praktiko de nia lando. Ĉio ĉi tio estas grandega puŝforto por la alproksimiĝanta tajdo de nia ekonomia kaj kultura konstruado.

Ĉi tie ni volas speciale emfazi, ke en la lernado de Sovetio ni ne devas nin limigi nur ĉe scioj de la progresaj sciencoj kaj teknikoj. Lerno pri tio, kompreneble, estas tre grava. Sed tio sola ne sufiĉas, kaj ni devas lerni ankaŭ la altan spiriton de internaciismo kaj patriotismo, la kolektivismon kaj sindonan laborem, la grandan decidemon pri mondplibonigo, la sentiman persistecon kaj bravecon por venki ĉiajn malfacilojn, la vivecon kaj optimismon, la sentemon pri freŝaj aferoj, la varman amon al novaj aperaĵoj, la kreemon kaj altajn komunismajn virtojn de la Sovetiaj komunistoj kaj popoloj persone instruataj kaj kulturataj de Lenin kaj Stalin. Ĉion ĉi tion ni devas bone lerni, por instigi la popolon de nia lando pli konvinkoplene defendi la sekurecon de la patrolando kaj la mondpacon, plenumi la novdemokratian konstruadon kaj firmiĝi marŝi al socialismo.

Dum la pasintaj tri jaroj la Ĉinia-Sovetia Amikeca Asocio klopodis per tre granda forto en la granda kaj sankta laboro plifirmigi kaj disvolvi la amikecon inter Ĉinio kaj Sovetunio kaj lerni la Sovetiajn spertojn. Per la disvolviĝo de la laboro la Ĉinia-Sovetia Amikeca Asocio jam fariĝis la plej granda amasorganizo en la tuta lando; ĝia membraro kreskis de 17,300,000 personoj en la pasinta jaro ĝis 38,900,000 personoj en la nuna tempo, t.e. 125% plimulte. Nun tra la tuta lando jam disvastiĝas la organizoj de la Asocio kiu havas 7 ĉefajn filiojn, 13 filiojn en municipoj rekte gvidataj de la Centra Popola Registaro aŭ la Administraj Distriktoj, 32 provincajn filiojn, 80 filiojn en municipoj rekte gvidataj de provincoj kaj 1,771 guberniajn filiojn, la nombro de la elementaj organizoj—subfilioj—jam plimultiĝis de 44,778 antaŭ unu jaro ĝis 119,978 nun. De post la reprezentanta kunveno de la tutlandaj asocio-filioj, kiu okazis lastjare, la propagandaj trupoj kaj pozicioj de la Asocio estas multe pli grandigitaj kaj la laboro ankaŭ paŝon post paŝo iras pli profunde.

Por plifirmigi la grandan amikecon inter la ĉina kaj Sovetia popoloj kaj levi inter nia vasta popolo pli altan tajdon de lernado de Sovetunio, la Ĉinia-Sovetia Amikeca Asocio decidis okazigi en la ĉi-jara novembro landskalan movadon de "Ĉinia-Sovetia Amikeca Monato," kiu estos ankoraŭfoja granda manifestacio de la popolaj pacfortoj kontraŭ la imperiisma agrestendaro de post la Packonferenco de la Azia kaj Pacifika Regionoj kaj ankaŭ alia grava preparo por la Packonferenco de Tutmondaj Popoloj okazonta en decembro de la kuranta jaro; kaj kiu estos samtempe laŭta preludo por la eniro

de nia granda patrolando en grandskalan ekonomian kaj kulturalan konstruadon. Tiam la tuta popolo de Ĉinio, ĉu laboristoj, ĉu kamparanoj, ĉu intelektuloj, industriistoj, komercistoj, diversaj nacioj, ĉiuj mobiliziĝos por bonvenigi kaj aranĝi la grandiozan "Ĉinia-Sovetian Amikecan Monaton". Nia granda alianclando Sovetunio ankaŭ sendos sian delegitaron kaj artan laborgrupon al ni por festi kaj partopreni tiun ĉi grandiozan movadon kaj havi vastan kontakton kun la vasta popolamaso de nia lando.

En la pasintaj tri jaroj nia patrio gajnis grandajn venkojn en ĉiuj frontoj. Ekde nun la centra tasko de nia popolo estos daŭra plifortikigo de la landdefenda forto, defendo de paco en la Malproksima Oriento kaj la mondo, kaj ĉiufanka kaj laŭplana plenumo de la grandskala ekonomia kaj kultura konstruado, por firmiĝi evoluigi nian landon al la socialisma estonteco. Por akcepti kaj plenumi tiun ĉi malfacilan kaj grandan taskon, la decida kondiĉo estas daŭre plifirmigi kaj disvolvi la amikecon kaj kunlaboron inter Ĉinio kaj Sovetunio kaj pli energie lerni de Sovetunio la progresajn spertojn. Sub la gvido de la Ĉina Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ Ze-tung kaj sub la intima zorgo kaj helpo de la Sovetia popolo kaj ties registaro, la tuta membraro de la Ĉinia-Sovetia Amikeca Asocio kaj la ĉina popolo multe penante kaj tutforte utiligos kaj disvolvos tiun ĉi kondiĉon, por plenumi la gloran kaj grandan taskon suprediritan.

Vivu la granda kaj nerompebla amikeco inter la ĉina kaj Sovetia popoloj! Trad. J. Plinov

KURANTAJ AFEROJ

Ĉinia-Sovetia Amikeca Monato

La 7a de novembro ĉijare estos la 35a datreveno de la granda Oktobra Revolucio de Sovetunio. La ĉina popolo ne nur arde celebros tiun ĉi signifplenan feston kiel en la antaŭaj jaroj, sed ankaŭ organizas samtempe landskalan Ĉinia-Sovetian Amikecan Monaton ekde 7. nov. ĝis 6. dec. por plifortigi la solidarecon inter la popoloj de tiuj ĉi du landoj kaj lerni de Sovetunio progresajn spertojn en produktado.

En la Amikeca Monato, oni aranĝos diversajn popolamasajn agadojn en la formoj de lekcioj, paroladoj, kunsidoj, vesperkunvenoj, lantern-bildoj, ekspozicioj de Sovetiaj kinoj kaj bildoj, brodkastoj de Sovetiaj muzikoj; kaj ankaŭ eldonado de multaj broŝuroj kaj special-numeroj de ĵurnaloj aŭ gazetoj.

Jam antaŭ unu monato la Ĉinia-Sovetia Amikeca Asocio komencis la preparan laboron, kaj en la fabrikoj, registaraj institucioj kaj popolaj organizoj jam fondiĝis preparaj komitatoj aŭ oficejoj por tiu celo. Ankaŭ pere de la kunvenoj de virinoj, junuloj, kamparanoj, k.t.p. oni komencis tiun aranĝon. Invitite de la ĉina flanko, la Sovetia Kultura Asocio por Fremdlandoj decidis alsendi ampleksan delegacion kaj artistan trupon al Ĉinio por partopreni la Amikecan Monaton.

Riz-kontrakto Subskribita inter Ĉinio kaj Hindio

Je la 13a de oktobro, la reprezentantoj de la Ĉina Popola Respubliko kaj la reprezentantoj de la registaro de Hindio subskribis kontrakton pri 50,000 tunoj da rizo vendita de Ĉinio al Hindio. Ĝi estas la dua riz-kontrakto inter Ĉinio kaj Hindio post la riz-kontrakto de 100,000 tunoj en majo de la kuranta jaro kaj la kvina kontrakto pri eksportado de grenoj de Ĉinio al Hindio.

KURANTAJ AFEROJ

Popola Edukado en Pasintaj Tri Jaroj

Ma Ŝju-lun, Ministro de Edukado

Estas bone konata ke longdaŭraj subpremoj fremdnacia kaj feŭda alportis al la ĉina popolo apenaŭ elteneblan katastrofon. La korupta kaj perfidema reĝimo de la eksterordinare putra Kuomintang postlasis al ni ekonomie kaj kulture postiĝintan landon kies eduka heredaĵo estis despli kompatinda. Forrabita estis la rajto por edukiĝo de la granda kamparana kaj laborista popolamaso. 90 procentoj de la popolanoj estis analfabetoj. La feŭda, kompradora kaj faŝista edukado detruis la memestimon kaj memfidon de la junularo. En la regionoj regataj de la Kuomintangaj reakciuloj, ĉie estis videblaj tiaj mizeraj situacioj ke la junuloj ĵus gradiĝintaj el lernejoj aŭ vagadis surstrate kaj sekve degeneris pro senlaboreco, ĉar tiam gradiĝo signifis senlaboriĝon, aŭ trovis laboron tute diferencon ol tio, kion ili lernis en la lernejo.

Dum la pasintaj tri jaroj, la liberigita ĉina popolo unuiĝis ĉirkaŭ la Ĉina Komunista Partio, Prezidanto Maŭ kaj la Centra Popola Registaro, kaj sekvante la vojon de nova demokratio efektiviĝis fundamentajn politikan, ekonomian kaj socian reformojn. Rezisto kontraŭ Usono kaj helpo al Koreio, Agrara Reformo, Subpremo al la Kontraŭrevoluciuloj, Ideologia Reformo, kaj la 'Tri Kontraŭ' kaj 'Kvin Kontraŭ'—ĉiuj tiuj ĉi movadoj jam akiris grandajn sukcesojn sinsekve, kaj en la laboro de ekonomiaj restarigo kaj rekonstruado jam estis brilaj rezultatoj. Samtempe, por plialtigi la politikan konscion kaj kulturan nivelon de la popolo kaj por kulturi la kadrojn por nacia konstruado, la popola edukado de Ĉinio ankaŭ ricevis rapidan progreson kaj disvolviĝon.

En la vintro de 1949 kiam ĵus fondiĝis la Ĉina Popola Registaro, troviĝis en la tuta lando 191 altgradaj lernejoj kun pli ol 130,000 studentoj, pli ol 5,200 mezgradaj lernejoj kun pli ol 1,270,000 lernantoj kaj pli ol 346,700 elementaj lernejoj kun pli ol 24,200,000 lernantoj.

Dum la tri jaroj, la edukado de ĉiugradaj lernejoj ricevis grandskalan disvolviĝon. Ni nur komparu la nombrojn de lernantoj: La nombro de lernantoj en la elementaj lernejoj 77 procente pliiĝis en 1951, sed en ĉijara aŭtuno, ĝi 101 procente pliiĝis, nome pli ol duobligis, kaj la lernantoj atingis la nombron de pli ol 49,000,000. La nombro de lernantoj en la mezgradaj lernejoj 57.9 procente pliiĝis en 1951, sed en ĉijara aŭtuno ĝi 142.2 procente pliiĝis, nome preskaŭ du-kaj-duonobligis, kaj la lernantoj atingis la nombron de 3,078,000. La nombro de lernantoj en la altgradaj lernejoj 34.8 procente pliiĝis en 1951, sed ĉiaŭtune ĝi 69 procente pliiĝas kaj la studentoj atingas la nombron de 219,700. Se oni komparas la nunajn ciferojn kun tiuj en la plej alta jaro dum la Kuomintanga regado (1946), elementlernejaj lernantoj plimultiĝas 107 procente; mezlernejaj lernantoj, 63.9 procente; kaj altlernejaj lernantoj, 69.9 procente.

La Centra Popola Registaro speciale prizorgas la edukadon de la minoritataj nacioj. Jam estas fonditaj 9 Naciaj institutoj, en kiuj nun troviĝas 7,540 studentoj. La mezlernejaj lernantoj nombriĝas ĉijare 27

procente pli multe ol lastjare; dum elementlernejaj lernantoj, 11 procente pli. En la pli frue liberigitaj regionoj, 92 procentoj de la lernejaĝaj infanoj de la korea nacio en Nordorienta Ĉinio jam vizitas lernejon kaj tiuj de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio atingas 70 procentojn. Kelkaj minoritatoj ne havas skriban lingvon, kaj ni estas nun kreantaj skriban lingvon por ili por disvolvi ilian kulturon.

En la flanko de libertempa edukado por la laboristoj kaj kamparanoj: la nombro de lernantoj en la laboristaj libertempaj lernejoj atingis pli ol 2,000,000 en 1951 kaj 3,020,000 en aŭgusto ĉijara; la nombro de lernantoj en la kamparanaj libertempaj lernejoj atingis 14,000,000 en 1951 kaj laŭ antaŭkalkulo atingos pli ol 24,000,000 en ĉi tiu jaro; kaj la nombro de lernantoj en la vintraj lernejoj en la kamparo atingis pli ol 42,000,000 en 1951 kaj laŭ antaŭkalkulo atingos 50,000,000 ĉivintre. Speciale menciinda estas tio, ke la Metodo de Rapida Ellerno de Ideografoj kreita de K-do Ĉi Kien-hua ege mallongigos la proceson por likvidi la analfabetecon inter la multaj milionoj da laboristoj kaj kamparanoj. Ĉiugradaj popolaj registaroj estas nuntempe disvastigantaj per granda forto la M.R.E.I. kaj aktive preparantaj instruistojn por disvolvi grandskalan analfabetecon-likvidan kampanjon. Oni supozas ke en ĉi tiu vintro aŭ venonta printempo pli ol 10,000,000 analfabetoj inter la laboristaj kaj kamparanaj kadroj, industriaj laboristoj kaj junaj kamparanoj kleriĝos.

La ĉisupraj faktoj klarigas ke la disvolviĝado de edukado en nova Ĉinio multege superis la atingajojn tiuspecajn sub la 20-jara reakcia regado de Kuomintang.

La disvolviĝo de la popola edukado estas ne apartigebla de la reformo de la malnova edukado. Dum la pasintaj tri jaroj, la Popola Registaro jam firme, laŭplane kaj paŝo-post-paŝe efektiviĝis la reformon de la malnova edukado en diversaj flankoj.

Unue, estas la reformo de la eduka sistemo. En oktobro de 1951, la Administra Konsilo de la Centra Popola Registaro proklamis la 'Decidon pri la Reformo de la Eduka Sistemo', difinante novan edukosistemon



La Laborista Politika Lernejo en Ŝanhajo

plene konforman al la aktuala situacio de la komenca periodo de ĉina konstruado. La fundamenta spirito de la nova edukistemo estas: doni gravan pozicion al la edukado por la laboranta popolo kaj laboristaj kaj kamparanaj kadroj en la eduka sistemo de ĉiugradaj



Nove konstruita domo por la Ĉina Popola Universitato

lernejoj, garantiante por la laboranta popolo la ŝancon de edukigo; doni gravan pozicion al la edukado por specialaj okupoj, certigante la pozicion de ĉiugradaj kaj ĉiuspecaj trejnaj kursoj, suplementaj lernejoj kaj politikaj lernejoj por senĉese liveri kompetentajn laborantojn bezonotajn en la landa konstruado; ŝanĝi en la elementa edukado la antaŭan dugradan sistemon (kvar jaroj por la malsupera kaj du por la supera) en kvin-jaran seninterrompan sistemon por ke la infanoj de la laboranta popolo en la urboj kaj el la kamparo povu ĝui kompletan elementan edukadon. Krome, la sistemoj de ĉiugradaj kaj ĉiuspecaj lernejoj interligiĝas unu kun la alia kaj estas reciproke transireblaj, tiel ke, kiam la nova sistemo paŝon post paŝo efektiviĝos, ĉiuj vojoj senbare kondukas al universitato. Kiu ajn el la tutlanda popolo havos ŝancon ricevi altan edukadon, se nur li mem bone klopodas.

Due, ĉiuj edukaj organizoj malfermas pardonon al la laboristoj kaj kamparanoj. Por ke la edukado efektive fariĝu tiu de la popolamaso, ĉiugradaj lernejoj plenumas la planon malfermi pardonon al la laboristoj kaj kamparanoj, donante al la laboristaj kaj kamparanaj junuloj ĉiamanieran faciligon por la eniro en la lernejon. Plie, la registaro speciale fondis mallong-periodajn elementlernejojn por laboristaj kaj kamparanoj, rapid-ellernaj mezlernejoj por laboristoj kaj kamparanoj, laboristajn politikajn lernejojn kaj la Ĉinan Popolan Universitaton, por ensorbi la laboristajn kaj kamparanajn kadrojn kaj industriajn laboristojn en lernejon. Nuntempe tra la tuta lando, inter la lernantoj de la elementaj lernejoj, la laborista kaj kamparana elemento jam atingas pli ol 80 procentojn; inter tiuj de la mezgradaj lernejoj, ĉirkaŭ 60 procentojn; kaj inter tiuj de la altgradaj lernejoj, pli ol 20 procentojn. Ĉio tio ĉi estas senprecedenca fenomeno en la ĉina historio.

Trie, estas la ideologia remuldo de la instruistoj. Pro la disvolviĝo de la edukado de marksismo-leninismo kaj la teorioj de Maŭ Ze-tung, inter la instruistoj de ĉiugradaj lernejoj, kiuj respondas la alvokon de Prezidanto Maŭ "oferi la plej bonajn aĵojn al la laborantoj," nun arde disvastiĝas la movado de ideologia remuldo per sinedukado: lerni novajn ideojn, novajn vidpunktojn kaj novajn agmetodojn; kritiki malnovajn ideojn,

malnovajn vidpunktojn kaj malnovajn agmetodojn, strebi al la vero kaj forigi erarojn per la metodo de kritiko kaj memkritiko; kaj igi klara la dividlinion inter si mem kaj la malamiko kaj la ideologian dividlinion inter la laborista klaso kaj la burĝa klaso. Post ĉi tiu lerna movado, pli puriĝas la trupo de la popola instruistaro kaj pli altiĝas la labor-entuziasmo. Nun ili ĉiuj estas lernantaj proprave la progresajn edukajn spertojn de Sovetunio, kaj, aplikante al la aktualaj cirkonstancoj de Ĉinio, ili estas reviziantaj la diversajn instruplanojn kaj instru-skizojn, rekompilantaj la diversbranĉajn lern-materialojn, kaj unu paŝon antaŭen reformantaj la enhavon kaj metodon de edukado, kaj ili jam gajnis fundamentan sukceson kaj tiel garantias la daŭran altiĝon de la popola edukado en kvalito.

Kvare, estas la reordigo de la kolegioj kaj fakultatoj de la lernejoj. Por forigi la anarkian kaj nepraktikan staton en distribuo de lernejoj kaj labordivido inter iliaj fakultatoj kaj fakoj postlasitan de malnova Ĉinio, ke la popola eduko povu pli efike servi al la landa konstruado, la Popola Registaro jam dum la pasintaj tri jaroj faris ĉefpunktajn reĝustigajn kaj reordigajn laborojn por la kolegioj kaj fakultatoj en altgradaj lernejoj. En ĉi tiu jaro oni povos fundamente kompletigi la reordigon de teknikaj, agronomiaj, kaj instruistaj kolegioj, universitatoj kaj teknikaj lernejoj tra la tuta lando. La altgradaj teknikaj lernejoj pliiĝos de tridek unu ĝis kvardek sep; la agronomiaj kaj arbokulturaj kolegioj kaj lernejoj, de dek ok ĝis tridek tri; la instruistaj kolegioj, de tridek ĝis tridek kvar; kaj la medicinaj kaj farmaciaj kolegioj kaj lernejoj, de dudek naŭ ĝis tridek du. Post ĉifoja reordigo, la proporcio de teknikaj fakultatoj en la tutlandaj altgradaj lernejoj grandegiĝos. En la periodo sub la reakcia regado de Kuomintang en 1946, la nombro de studentoj en la teknikaj kolegioj de la altgradaj lernejoj tra la tuta lando okupis nur 18.9 procentojn de la tuta nombro de la studentoj en la altgradaj lernejoj, sed la nombro de la studentoj en la teknikaj fakultatoj ĉiaŭtune altiĝas ĝis 35.4 procentoj de la tuta nombro, okupante la unuan lokon. La nombro de la varbitoj de la mezgradaj teknikaj lernejoj okupas pli ol 38 procentojn de la tuta nombro de tiuj en la diversaj specialokupaj lernejoj, sekve ankaŭ la unuan lokon. Ĉi tia ŝanĝo kreas favorajn kondiĉojn en la kulturado de kompetentaj laborontoj por la industriigo de nia lando.

Kvine, estas la plialtigo de la politika pozicio kaj vivstato de instruistoj kaj lernantoj. En nova Ĉinio, ĉiuj instruistoj kiuj volas servi al la popolo ricevas respekton de la registaro kaj amon de la popolo. Precipe la junaj lernantoj, kiuj estas rigardataj kiel la espero de nova Ĉinio, ricevas prizorgon de la Popola Registaro. Ili ĝenerale starigis siajn popolamasajn organizojn—sindikatoj de instruistoj kaj asocioj de studentoj. En ĉiurangaj popolaj registaroj kaj en la konferencoj de popolaj reprezentantoj partoprenas ankaŭ iliaj reprezentantoj. Kun sinteno de mastroj de la lando, ili vaste kaj libere partoprenas la socian kaj politikan vivon. La salajroj de la instruistoj kaj la vivo de la lernantoj, kune kun la fundamenta pliboniĝo de ekonomio kaj financo de la lando en ĉi tiu jaro, estas ĝenerale reordigitaj kaj plialtigitaj. Komparante la ĉiaran meznombro normon de salajroj de la instruistoj

(daŭrigota sur p. 260)

Aŭdigas Ĉie Legadoj

Kleriga Movado en Tienzino

La movado de rapida lernado de ideografoj envolas kvazaŭ giganta ondego ĉiujn fabrikojn, stratojn, familiojn kaj individuojn en Tienzino. Precipe dum ĉi tiu unu monato la disvastiĝo de la movado atingis la plej altan tajdon. Tage kaj nokte, ĉie oni povas trovi kursanojn portantajn blujajn insignojn. Inter ili troviĝas laboristoj, urbanoj, junaj virinoj kaj knabinoj. Kelkaj kunportas librujojn dum aliaj benketojn kaj paŝas interparolante kaj ridante sur la stratoj. Kiam venas vespero, preskaŭ ĉie estas aŭdeblaj la voĉoj de legado por "sturmi" la novajn ideografojn. En kelkaj lokoj oni legas kaj donas samtempe klarigojn, dum en la aliaj oni kune laŭtvoĉe legas: "c—o co, tio signifas 'eraro'. d—i—aŭ diaŭ, tio signifas 'postlasi'..." Kaj sur la vizaĝoj de la "sturmistoj" la spontana rideto elmontris la nereteneblan ĝojon kiel tiu de batalanto akironta venkon.

En iu aŭtuna malvarmeta vespero mi iris sur la stratojn por ilin rigardi. Sub la lumo de strata lampo kelkaj triciklirigistoj kune staris kaj disputis pri la elparolo kaj la senco de iu vorto. Mi eniris en iun flankan strateton kaj vidis ke tie, kie forte brilis la lampo, unu virina kurso estas "dejore anstataŭanta" la alian: la membroj de la antaŭa kurso ankoraŭ ne eliris, tamen jam amasiĝis ĉe la pordo tiuj de la sekvanta kurso. Mi eniris en la novan parkon "Triumfo" kontraŭ la granda magazeno, kaj vidis ke tie ankoraŭ pli multaj estas la lernantoj. En ĉiu loko, kie troviĝis lamplumo, ronde sidis viroj kaj virinoj kun legolibroj en la manoj. Iu grupo estis komizoj, kiuj, post relernado de novaj ideografoj, ekkantis la kanton "Kvin Kontraŭ"*; alia grupo estis laboristoj, kiuj estis legantaj unu ideografon post alia, koncentrigante sian atenton. En kvietaj anguloj apud la muro sidis pli ol dek sinjorinoj, kelkaj eĉ kun mamsuĉantaj infanoj ĉe la sino. Kiam la junaj patrinoj voĉlegis: "j-a ja, ĝ-i-a ĝia," la infanoj lasis la mamojn pensante ke la panjo petolas kun ĝi kaj ekridis... Tie ĉi mi parolas nur pri la hazarda impreso en unu loko, tamen efektive la popolanoj en la tuta urbo de Tienzino estas envolvitaj en la lerna tajdo.

Laŭ statistiko, inter la pli ol 2,000,000 loĝantoj de Tienzino troviĝas proksimume 900,000 analfabetoj aŭ duonanalfabetoj. La libertempa klerigo kaj la publika klerigo en la lastaj jaroj havis ioman efikon al la forigo de analfabetoj, sed ili estis tre malrapidaj metodoj, nekonformaj al la disvolviĝo kaj la bezono de la objektiva situacio. Oni antaŭkalkulas, ke, de post la disvastiĝo de la Metodo de Rapida Lernado de Ideografoj, ĉe la fino de ĉijaro ni povos forigi 320,000 analfabetojn; tamen ĝis nun la membroj de la lernkursoj jam nombriĝas je 300,000, el kiuj pli ol 100,000 estas virinoj, dum la aliaj — laboristoj kaj ĝeneralaj urbanoj. Laŭ la decido de la Municipala Registaro proksimume 140,000 membroj lernantaj en la libertempaj lernejoj transiros al la novaj kursoj, kaj tiam ili ne plu iros la

tede longan vojon kaj povos fini sian lernadon ĉirkaŭ septembro.

Kiam la Tienzinaj popolanoj eksciis, ke Tienzino estas la unua urbo, kiu grandskale disvastigas la movadon de rapida lernado de ideografoj, ili kun granda stimuliĝo diris: "Vidu, nun ankoraŭfoje Tienzino iras la unua." La laborantaj popolanoj, fariĝinte mastroj de la ŝtato kaj ricevinte sufiĉajn nutraĵojn kaj vestaĵojn, nun komencas lerni por altigi sian kulturen nivelon kaj mastri novajn instrumentojn kaj metodojn. Ili dankeme diris: "Prezidanto Maŭ ja ĉiam pripensas por ni ĉiuflanke!" Parolante pri la "Decido pri la Problemo de Labora Enokupigo" la virinoj diris: "Penu lerni! Estas multaj laboroj, sed se oni ne bone lerni, oni povas nur vane rigardi." Kelkaj 60-70-jaraj maljunulinoj, kiuj neniam antaŭe revis ke ili iam dum tiu ĉi vivo havos la feliĉon "legi", nun informiĝinte ke tio estas la alvoko de Prezidanto Maŭ, ankaŭ alvenis kaj partoprenis en la kurso. Ili diris: "Neniam malpravas la vortoj de Prezidanto Maŭ." Kelkaj maljunulinoj karese tuŝadis la nove ricevatajn blujajn insignojn kun nigre presitaj ideografoj kaj diris memfide: "Atendu kaj mi vin ellernos post kelkaj tagoj." En la 11-a Distrikto de la urbo estis 73-jara maljunulino, kiu volis sin registri por partopreni en la kurso, kaj pro ŝia granda aĝo la funkciulo admonis ŝin ne partopreni. Sed tiu ĉi maljunulino ne estis facile konvinkebla, tial ŝi mem aĉetis legolibron, alvenis per helpo de bastono ĉiutage kun benketoj kaj sidis apud la fenestro ekster la klasĉambro por aŭskulti la lecionon. Tiamaniere ŝi kune kun la aliuloj ellernis la fonetikajn signojn kaj la silabodon, kaj krom tio ankaŭ ellernis pli ol cent ideografojn. Kiam oni denove varbis lernantojn, ŝi refoje aliris; kaj kiam la funkciulo ree rifuzis ŝin per la antaŭaj konsiloj, ŝi estis malpacienca kaj diris: "Vi min ekzameni!" Kaj finfine ŝi ricevis permeson. La laborantaj popolanoj ja tiel fervore partoprenas en la kurso por lernado de ideografoj. En Sungpu Li de la sama Distrikto, estas tridek-kelkaj loĝantoj, krom la lernantoj-infanoj kaj unu 3-jara infano, ili ĉiuj partoprenis en la kurso. En la Unua Distrikto oni laŭplane intencis nur akcepti 10,000 kursanojn, utiligante la klasĉambrojn de la elementaj lernejoj dum la somera libertempo, sed rezulte, nur en la unuaj tri tagoj jam 16,000 individuoj sin registris. Nun tra la tuta urbo krom la 300,000 kursanojn estas ankoraŭ grandnombro da individuoj kiuj lernas malrekte de la lerno-grupanoj. Tial la ĉi-jara projekto pri la forigo de analfabetoj estas ne nur plenumebla, sed estas superplenumebla.

Krome, la Federacio de Tienzinaj Sindikatoj decidis, ke de 1-a ĝis 5-a de septembro en ĉiu fabriko kun pli ol 300 laboristoj oni nepre grandskale disvastigos la movadon por leg-lernado; kaj ke en ĉi-jaro oni nepre forigos la analfabetojn en fabrikoj kun pli ol 300 laboristoj.

En ĉiuj distriktoj de la urbo la movado de leg-lernado ja estas plena de arda entuziasmo. En tiu ĉi entuziasma tajdo la popolamasoj mobiliziĝis, la malfacilo de klasĉambroj kaj aliaj necesaj objektoj estas konkerita kaj la problemoj de instruistoj ankaŭ estas unuapaŝe solvita. Unuvorte, la popolamasoj estas la

(daŭrigo sur p. 253)



Dekoraciojo en la vestiblo de Huajjen Tang.




Halo de Huajjen Tang, kie okazis la Paĉkonferenco de la Azia kaj Pacifika Regionoj.

Granda Konferenco por Paco


En la Paĉkonferenco de la Azia kaj Pacifika Regionoj okazinta en Pekino de la 2-a ĝis la 12-a en oktobro partoprenis 367 delegitoj el 37 landoj. Ĝi estas grandioza manifestacio de la volo de 1,600,000,000 popolanoj en la Azia kaj Pacifika regionoj konservi pacon kaj sian nacian sendependecon kaj fini la militan aventuron de Usonaj imperiistoj.




La ĝojaj popolamasoj bonvenigas la venintojn de la pacaj delegitoj en la amaskunveno.



Amaskunveno de 50,000 popolanóĵ en la korto de Taj ho Tien de la fama Imperia Palaco celebras la sukceson de la Paĉkonferenco. Junuloj kun blankaj ĉapoj formis du ideografojn 和平 (paco) en la amaso.



La fervojo transiras
la trankvilan Vej-
riveron.



KOREKTO

Sur la paĝoj 228 kaj
250 la longeco de
la Tienŝuj-Lanĉoŭ-a
Fervojo devas esti
346 kilometroj.

TIENŜUJ-LANĈOŬ


La 347-kilometrojn longa Tienŝuj-Lanĉoŭ-Fervojo et-
kuranta okcidenten ekde Ĉina Maro. Ĝi ludos grandan rolon en la
granda Nordokcidento de Ĉinio. La konstrua laboro
finiĝis en 27 monatoj.


Profunda intermonto kunligita per ŝtala ponto



Organizito por la disvolvo de la Nordokcidento

Preparado por foreksplodi rokozan montflankon







-FERVOJO

Las daŭrigo de Lunghaj-Fervojo
 ndan rolon en la konstruado de
 komencis ekde majo, 1950 kaj


La lasta el la 1,000
 pontoj de la fervojo
 konstruata




Neforgesebla tago — po-
 polanoj de ĉiuj naciaj
 minoritatoj en la Nord-
 okcidento akلامas la
 unuan vagonaron venan-
 tan al Lanĉoŭ.

Tipa malfacila fervojo

Tunelo tra loeso





Wilcox (el Usono) salutas al Han Sul Ya (el Korea Deleĝacio) prezentas al la Korea Deleĝacio arbon kaj donacojn kiel simbolon de amikeco.



Nguyen Thi Chien, herooa gerilano de Vietnamo intime parolas kun franca pacbatalantino Raymonde Dienne

La Amikeco de la Porpacaj Popoloj

en la Pakkonferenco de la Azia kaj Pacifika Regionoj

Estas multe da kortuŝaj momentoj en la Pakkonferenco, kiam la delegitoj el diversaj landoj garantiis sian nedisigeblan amikecon kaj komunan volon ĉesigi la militon.



Mun Yae Bong, la fama korea aktorino-delegito salutas ĉinan amikon Juna Pioniro.

Manki Sharif de Pakistan (maldekstre) kaj Saitin Kitchlew de Hindio gratulataj de la delegitoj subskribo de la kuna deklaro pri paca dispono pri problemo de Kashmir.

Monica Felton kaj Ivor Montagu de Britio ĉirkaŭprenas Chan Suat Hong kaj Liensin de Malajo.



Aŭdiĝas Ĉie Legadoj

(daŭrigo de p. 248)

fonto de forto kaj nenio estas neplenumebbla kun la subteno de la popolamasoj. En la 11-a Distrikto la dektri bazaj komitatoj (po unu komitato por ĉiu subpolicejo) tre rapide aranĝis 14 trejnajn kursojn por instruistoj kaj akceptis grandnombron da aktivuloj. La problemo de la ĉambroj ankaŭ estis tre rapide solvita dank' al la entuziasma subteno de la popolamaso. En la 11-a Distrikto oni mobilizis per diversaj manieroj la domposedantojn kaj rezulte luis pli ol 200 ĉambrojn. Kelkaj domposedantoj, informiĝinte ke oni aranĝos kurson, memvole oferis siajn ĉambrojn. Iu maljuna sinjorino Kaŭ provizis al la kurso tri sudajn ĉambrojn kaj diris: "Nu, vidu, ĉu sufiĉas? Se ne, tie restas ankoraŭ orienta ĉambro." Alia maljunulino ne nur provizis ĉambrojn, sed ankaŭ lampojn kaj akvon, kaj krome aĉetis 30 tetasojn por la kurso. Ŝi diris: "Voĉlegante oni facile soifas, ĉu eblas ne trinki?" En la 2-a Distrikto la kursoj funkcias en tiaj lokoj kiaj la grandaj provizejoj, lignejoj, fabrikoj kaj manĝosalonoj. Iu vendejo de elektraĵoj instalajoj eĉ senpage fiksis elektraĵojn por la kursoj. Tamen ne gravas eĉ se la ĉambroj ne sufiĉas. En la 11-a Distrikto iu kurso funkcias sur nove ebenigita spaco, kie antaŭe estis malpura kotakvejo, kun nigra-tabulo sur la muro kaj brilantaj elektraĵoj lampoj.

Por la virinoj kiuj iras al klerigaj kursoj, la var-tado de infanoj ja estas problemo. Sed, pro la arda deziro de virinoj al la lernado kaj la publika zorgado pri la klerigo de virinoj, tiu ĉi problemo ankaŭ estis solvita.

Unue oni tiun problemon solvis en la familio: la bopatrino kaj bofratinoj zorgas la infanojn por la lernantino. Kaj due, la samloĝantoj kaj najbaroj reciproke helpas: kiam bofranco Ĉang devas iri al la kurso, ŝi metis sian infanon en la hejmo de bofranco Li, kaj poste, inverse. En multaj lokoj oni ankoraŭ aranĝis 'infanstaciojn' kaj infanvartejojn. En difinita horo oni kondukas sian infanon el la 'stacio', kie la senrekompencaj vartistinoj ricevas la infanojn kaj ilin prenas hejmen, kaj antaŭ la fino de la leciono la vartistinoj denove resendas al la stacio la infanojn, kiujn la panjoj kondukos hejmen. La infanvartejo, estas pli regula. Tiuj ĉi aranĝoj donas grandan helpon al la virinoj kiuj lernas en la kursoj. Ekz. Tu Hung-ĵing de la 6-a Distrikto vizitis la kurson kun infano, kaj post duonmonata lernado ŝi eĉ ne tute konis la fonetikajn signojn, tamen post kiam oni aranĝis la infanvartejon, nur per 5-6 tagoj da lernado ŝi jam konis ilin. Post unu kaj duonmonato ŝi jam ellernis pli ol 1,700 ideografojn, kaj skribis dankleteron al Prezidanto Maŭ.

En la batalkampoj de rapida leg-lernado la instruistoj ja estas komandantoj, de kiuj dependas venko aŭ perdo. Ili respondis la alvokon de la registaro kaj iris sur tiun ĉi gloran postenon.

El la pli ol 13,000 instruistoj estis pli ol 6,000, kiuj venis el la laboristaj libertempaj lernejoj kaj la publikaj libertempaj lernejoj, kaj cetere el la instruistaj lernejoj por laboristoj kaj kamparanoj. Tiuj ĉi membroj konsistis el pedagogoj kaj intelektaj virinoj. Kaj la aliaj 7,000 instruistoj venis el la popolamaso, kiuj estas tre fervoraj en sia laboro. En la 10-a Distrikto estis kudristino Kuan Ŝuang-jin, kiu eĉ ne konis la

signojn sur la mezurilo kiam ŝi komencis lerni kudroar-ton. Kiam ŝi finis la kurson, ŝi memoris pri sia antaŭa mizero kaj diris: "Al la aliaj mi ĉiam volas instrui, kion mi ellernis." Pro tiu motivo ŝi aranĝis "Leg-lernan Kurson por Dommastrinoj". Kuan Ŝuang-jin estas plej bona ekzemplo de analfabeto kiu fariĝis instruistino. Tial multaj virinoj sin registris kaj aliĝi al ŝia kurso.

Por akceli la movadon, la Popola Radiostacio de Tienzino instruas leg-lernadon per brodkasto. Nun la aŭskultantoj jam eniris en la etapon de legado kaj skribado. Antaŭe oni opiniis ke malfacile estas instrui skribadon brodkaste, sed fakte ili eraras. Laŭ la metodo de rapida lernado la radiostacio instruas skribadon, strekon post streko, kaj cetere, kun la helpo de la asistantoj, estas nenio malfacila. La asistantoj ludas tre gravan rolon en la instruado per radio. Ĉiutage post la regula unuhora lernado, la aŭskultantoj lernas kolektive sub la gvido de la asistantoj, kiuj samtempe kolektas la koncernajn demandojn por ilin solvi dimanĉe kiam ĉiuj asistantoj kunvenos. La sperto de Tienzino pruvas ke la instruado per radio estas rekomendinda rimedo por solvi la problemojn pri nesufiĉo de instruistoj kaj klasĉambroj.

— Elĉinigiis Zekun —

*"Kvin Kontraŭ"—Granda landskala movado por forigi kvin specojn da leĝrompaj agadoj de la privataj entreprenoj. Ĝi okazis ĉijare jan.—jun. tra la tuta Ĉinio. Vidu pg. 58-59.

Kompetentaj Ni Ambaŭ en River-Subjugado kaj Lernado

Verkis kolektive la laboristoj de la Bajŝa
Akvokonservejo en Honan-provinco

Ektondras la trumpeto, ruĝas la oriento,
Kun iloj sur la ŝultroj iras ni al la labor'.
Printempa milda brizo nin karesas per ekblovoj
Kaj verda grenkamparo etendiĝas ĝis la for'.
Ventorapide kuras ni puŝante la ĉaretojn
Kaj la aero ĉie vibras de gaja kantsonor'.
Ŝvitegas tiuj, kiuj la terbulojn enĉarigas,
Dum la aliaj puŝas la ĉaretojn kun fervor'.
Aŭ ĉaron antaŭ si puŝante aŭ per ter' ŝarĝante
Ĝoje-tumulte arietojn kantas ni en ĥor'.
Jen fajfo por ripozo. Skribon ni eklernas
Por ke ne pasu senutile la libera hor'.
Jen ni laboras kore kaj lernas liberhore,
Branĉetoj estas por ni plumoj, kaj papero nia—
La laboro-teren' kovrita de polvotavol'.
Fremdas por ni nek ĝentila nek kruda labor'.
Lernejon ni eniros subjuginte Huaj-riveron,
Kaj ĉiu jam fariĝas tie lerta monitor'.

Elĉinigiis S. J.

Hejmo de Ordinara Laboristo

Ĉen Ting-ju

Iun posttagmezon en julio, mi vizitis la hejmon de Ĉang Ĉen, laboristo de Ŝekingŝan-Elektrejo, kiu provizas elektron al Pekino kaj la ĉirkaŭurbaj partoj.

Kiam mi atingis lian hejmon por fari intervjuon, li jam antaŭ nelonge iris al deĵoro. Ambaŭ liaj gefiloj ankaŭ ne estis hejme, kaj lia edzino min akceptis kaj gastigis.

Al loĝantoj de Ŝekingŝan, kiu estas dudek kilometrojn sudokcidente de Pekino, ĵurnalistoj ne estas fremduloj. Tial, tuj post la rekomendo de Sekretario Juan de la elektreja sindikato, ni ekinterparolis sencere monie.

"Ni ne antaŭvidis, kamarado, ke vivo povus esti tiel kiel la hodiaŭa!" ŝi ĝoje diris al mi. "Rigardu, kio en nia hejmo ne estas kontentiga?"

Vere, nenio estas ne kontentiga.

Ili havas loĝejon el du ĉambroj. La kuirejo sin trovas en la malantaŭa korto, kaj la alia estas dividita en gastĉambron kaj dormĉambron. La posttagmezaj sunradioj brilis sur la ombrigilo el kukurbacoj en la korto, kies verdeta ombro reflektis tra la fenestra gazo sur la blankaj muroj kaj estigis trankvilan, plezuranton.

En la gastĉambro diversaj objektoj kuŝis en konvenaj lokoj. Sur la kvadrata ruĝlakita tablo estis metita delikata te-servico. Apud la tablo estis apogseĝoj kun blankaj kovriloj. Sur la longa tablo apud la vitra ŝranko staris vekhorloĝo kaj granda florumo dum orfiŝa pota kaj radio estas ĉe la flankoj. Estus eble miskompreni ke tiu ĉi estas studĉambro de malnova kampara ĝentilulo, se ne troviĝis sur la muro la portreto de Prezidanto Maŭ kaj sur la bretoj modernaj libroj anstataŭis la vermboritajn antikvajn klasikojn.

La mastrino informis min ke tiu ĉi estas domo nove riparita de la Elektrejo. Ili translokiĝis al tiu ĉi loĝejo jam ĝuste unu jaron. La domo nun sufiĉas por ili, ĉar unu pliaĝa filo loĝas ĉe la pensiono de la lernejo. Antaŭe tiu ĉi domo estis la pensiono de la oficistoj, kaj la laboristoj povis nur loĝi en la duondetrinitaj kabanoj ĉe la du ekstremaĵoj de la vilaĝo. Lastjare tiuj kabanoj estis forigitaj, kaj sur la loko ekstarigis novaj domoj en bohordaj vicoj. Dum la kelkaj jaroj post la liberiĝo la Elektrejo jam konstruis pensiojn kun kvin cent ĉambroj por laboristoj, ne enkalkulante la riparitajn.

"Floroj, kvankam belaj, bezonas la ornamon de verdaj folioj," ŝi kontente klarigis. "Kiam ni ĵus enloĝiĝis en tiun ĉi domon, la kvar muroj estis tute malplenaj. En la hejmo troviĝis nenio krom unu lito, unu tablo kaj unu sapokesto por enteni milion. Dum la kuranta jaro, ni aĉetis tion kaj ĉi tion, kaj nun almenaŭ iom aspektas kiel hejmo."

"Ĉu vi volas diri ke nur ekde lastjaro via vivo pliboniĝis?"

"Ne, bona vivo komenciĝis ekde la liberiĝo. Sed, kamarado, post satiĝo oni ankoraŭ devas zorgi pri

vestaĵoj kaj kovraĵoj! Venu!" Ŝi eka-kompanis nin al la dormĉambro.

La dormĉambro ne estis tre granda, sed sufiĉe bonorda kaj pura, estigante komfortan senton. Sur la lito estis mato por somera uzo. Blanka littuko elmontriĝis ĉe la fronto de la lito. Lankovrilo kaj broditaj kapkusenoj restis ĉe unu fino.

"Tiu ĉi," ŝi montris al la du grandaj kestoj apud la tualettablo, dirante, "pleniĝas je vestaĵoj, preskaŭ ĉiuj el ili estas novaj. Nun, ni ne nur havas sufiĉe por nin vesti, sed ankaŭ pli kaj pli zorgas pri kvalito kaj stilo. Lastjare, nur nia filino Malgranda Jing havis vestojn el desegnita kalikoto, nun eĉ mi mem havas. Neniam antaŭe estis okazo por tia tualetto, eĉ dum tempo de geedziĝo."

Findirinte, mia gastigantino mallevis sian kapon kaj ekordigis sian veston el desegnita kalikoto, ŝajne iom hontema. Antaŭe en vilaĝo kia tiu ĉi, virino pli ol kvardek-jara en desegnita vesto estis ja novaĵo.

Ŝi preparolis kun larmoj pri la tagoj dum la dudek kelkaj jaroj post sia edziniĝo. Antaŭ la liberiĝo, la salajro de Ĉang Ĉen ne sufiĉis por subteni la familion. Ŝi devis eliri kolekti karborestaĵojn kun infano surdorse. Vespere, reveninte, ŝi devis ankaŭ kudri por gajni iom. La tuta familio manĝis maizon, nigrajn fabojn por bestoj, kaj dum la japana okupo ankaŭ manĝis foliojn de la ulmo. Ne estas bezonate mencii pri la vestaĵo, neniŭ deca vesto sin trovis en la tuta domo, kaj la lit-kovrilo konsistis el kanab-sakoj. Se la horloĝo ne frapus, memorigante mian gastigantaron pri tempo por kuro, ŝi daŭrus rakonti pri pli multe da pasintaj suferoj.

La dommastrino insistis ke mi manĝu ĉe ŝia hejmo. Ŝi diris: "Eble Sekretario Juan pli ŝatas manĝi ĉe sia propra hejmo, kaj mi lasas lin elekti laŭplaĉe. Vi, estu senĝena kiel hejme. Nun ni laboristoj jam estas sufiĉe riĉaj por regali gastojn per vespermanĝo. Plue, vi povos vidi miajn du gefilojn dum la tempo de manĝo."

Mi vidis ilin antaŭ la manĝo.

La pliaĝa knabo, Ŝu-kjun, estas dekkvinjara kaj junulligano. Li studas ĉe la proksima gimnazio, dum la somera libertempo, li revenis hejmen, kaj noktis en la pensiono de la Elektrejo. La filino, Malgranda Jing, jam eniris kindergartenon. Ŝi havas grandajn brile nigrajn okulojn, kaj ŝia hararo en du plektajoj pendas ambaŭ flanken de la kapo. Alta kaj dika, ŝi neniom aspektas sesjara.

Mia gastigantino iris al la kuirejo.

Ŝu-kjun alportis al mi kanvasan kuŝ-seĝon, kaj Malgranda Jing donis al mi ventumilon. Babilante, ili ekintimiĝis kun mi. Malgranda Jing parolis pli multe ol sia frato, kaj pli interese. Ŝi diris al mi kie ili ĵus ludis. Ŝi demandis ĉu mi iam antaŭe alvenis al tiu ĉi loko, ŝi demandis kiel Pekino aspektas, ŝi demandis pri tio kaj ĉi tio, tiel ke mi, la intervjuanto, fariĝis ŝia intervjuato.

Jen komencis la vespermanĝo. Sur la tablo metiĝis du pladoj da mangaĵoj, bovaĵo fritita kun cepo, kaj porkaĵo kuirita kun lento. Krome estis pelvo da ovosupo. Ĉiuj pladoj kaj pelvo estis plene plenigitaj.

"Vi ja speciale regalas min kiel gaston," mi sentis min maltrankvila antaŭ tiu ĉi riĉa vespermanĝo.

"Tute ne, tia ja estas nia ĉiutaga manĝo."

Ŝi diris al mi ke post la liberiĝo ili ekpovis manĝi tritikon kaj rizon. Viando, ovo, koko, fiŝo, kiuj antaŭe neniam aperis sur la manĝotablo, nun fariĝas ilia ĉiutaga manĝaĵo. 'Ĝiaŭz' (malgrandaj pastaĵoj en formo de duonluno kun viando kaj legomo interne) kiujn ili ne povis manĝi eĉ en la novjaro, nun ili manĝas de tempo al tempo.

Post la vespermanĝo, ŝi parolis pri siaj enspezo kaj elspezo.

Ĉang Ĉen enspezas sescent kvindek mil juanojn pomonate. El tio, lia salajro estas kvincent kvindek mil, kaj la cetera estas premio, kiu ne prezentas fiksitajn sumon sed varias de maksimume egalo al unu-monata salajro ĝis minimume kvindek mil. La salajro de Ĉang Ĉen plimultiĝis je dek ok procentoj, kompare al tio antaŭ la alĝustigo de salajroj en majo de la lasta jaro, kaj kompare al tio antaŭ la liberiĝo, plimultiĝas pli ol duoble.

Pri la elspezo, manĝaĵo formas la ĉefan parton, ducent sesdek mil pomonate, kaj diversaj elspezoj sumiĝas je cent kvindek kvin mil juanoj.

Ne estas bezonate elspezi por la lernejoj pagoj de Ŝu-kjun. Eĉ lian manĝopagon en la lernejo ili pagas je duona malmultigo. Inkluzive pagon por libroj kaj poŝmonon tio sumiĝas je kvindek mil pomonate. Ĉi tie, la dommastrino precipe menciis pri la nova sistemo de subvencio al la tutlandaj gimnazioj kaj studentoj en universitatoj kaj kolegioj, kiu ekfunkciis ekde ĉi tiu septembro. Tiel, ŝi diris, eĉ la duonpago por la manĝo poste ne estos surŝultrita de la gepatroj.

La tuta elspezo jen estas kvarcent sesdek kvin mil juanoj.

"Kiel pri la domlupago, akvo, elektro kaj tiel plu?"

"Eĉ groŝon ne bezonas, la Elektrejo pagas por ĉio ĉi, kaj eĉ por hejtaĵo duono estas subvenciata. La lernolibroj por Ĉang Ĉen kaj por mi estas provizataj de la sindikato. Ni ĉiumonate vidas kinofilmon kvar fojojn, por kio ankaŭ pagas la sindikato. Por sinbano estas senpagaj banejoj."

"Se okazas malsano?"

"Se okazas malsano," ŝi diris, "ni iros al la kuracejo de la fabriko. Laŭ la Laborasekura Regularo, ni bezonas elspezi neniom por tio. Dum foresto pro malsano la salajro de la laboristo estas pagata kiel ordinare."

"Do, vi ŝparas multe da mono!"

"Ne, ni aĉetis multon. Nun nia depono eĉ la banko ne atingas milionon. Per tiu sumo Ĉang Ĉen planas aĉeti por mi lanveston, sed mi volas aĉeti por li paron da ledŝuoj kaj novan kotonremburitan veston. Ni ankoraŭ ne decidiĝas."

Tiam aŭdiĝas paŝo ekster la pordo. La mastrino ĝoje diris: "Estas li revenanta."

Ĉang Ĉen ne estas tre elstara en staturato, sed li havas impresajn trajtojn. Li havas grandan senharan kapon kaj dikajn brovojn. Kvankam li ridetas de tempo al tempo, li aspektas, entute, serioza homo.

"Vi jam havas ĉiuf flankan komprenon pri mia familio," li humore rimarkis kiam lia edzino prezentis min al li. Li arde manpremis kun mi kaj demandis, pri kio alia mi deziris informon.

Kvankam estis jam tre malfrua en tempo, mi ne povis ne provi iom kompreni pri la mastro mem antaŭ mia foriro. Li sincere respondis al mia peto.

Ĉijare li havas kvindek du jarojn. Antaŭ tridek unu jaroj li eniris la fabrikon kiel metiolernanto. Nun li estas teknika laboristo en la vapormaŝinejo.

"Nun, mi ne deziras preparoli pri la antaŭaj okazaĵoj. Tio memorigas min pri la sufero en la malnova socio. Ni iam suferis de malsato, de batado... , nur nun ĉio ŝanĝiĝis," li findiris kun malpeziĝanta koro.

Jes, ĉio ŝanĝiĝis. Ĉang Ĉen antaŭe estis duon-analfabeto. Post partopreno en postlabora lernado de la fabriko, ambaŭ legopove kaj teknike li leviĝis en nivelo. Nun li povas legi la Elektitajn Verkojn de Maŭ Ze-tung. Antaŭ nelonge li estis promociita ĝis kvina grada teknikisto (En Ŝekingŝan-Elektrejo laboristoj estas dividataj en ok gradojn kaj la plej alta estas la oka grado).

Laŭaspekte, Ĉang Ĉen estas juna por sia aĝo. Li estas kompetenta en sia laboro, kaj aktiva en lerno kaj amasaj agadoj. Lia fervoro estas kompareble al tio de junuloj. Dum liberhoroj, li ŝatas ludi ŝakon, pasigante kelkajn horojn en tio dum unu fojo. Li malofte forestas de la ĉiusemajna prezentado de filmo en la fabrika klubo. En sia hejmo, Ĉang Ĉen ŝatas iom legi kaj aŭskulti al la brodkasto. Lia edzino ŝatas la programeron de loka dramo dum li ŝatas novaĵon kaj politikan raporton. Tial, rilate al aŭskulto de radio-programeroj la geedzoj ofte bezonas interkonsiliĝon por solvi la problemon.

"Junaj kamaradoj nomas lin 'maljuna aktivulo'," lia edzino informis min sen mia peto. Mi demandis de kie li havigis al si tian entuziasmon.

"Unuvorte, la liberiĝo!" li diris ekscite. "Nun, mi havas nenian zorgon, mi estas kontenta pri hodiaŭ, hodiaŭ mi vivas bone; kaj mi ankaŭ ne timas pri morgaŭ, morgaŭ neniun forigus min el la fabriko..."

"Plue," mi interrompis lian diron, "kiam vi estos sesdek jara, vi havos pension laŭ la Laborasekura Regularo."

"Tio dependas de tio, ĉu mi volas ekŝiĝi el laboro en tiu tempo. Laŭ mia opinio, mi povos plu labori por dek kvin jaroj. Ne pensu ke maljuna Ĉang nun estas tre maljuna!" Li etendis siajn dikajn brakojn. "Ĝus mi diris ke mi estas kontenta pri hodiaŭ, tio ne signifas ke mi ne havas pli da postuloj pri la estonteco."

Jes, Ĉang Ĉen, samkiel ĉiuj laboristoj de Ĉinio, ne limas sin je la bona vivo de hodiaŭ, nun jam luktas por pli bela morgaŭo!

Trad. Censinio.

KURANTAJ AFEROJ

Forigado de Senlaboreco en Nordorienta Ĉinio

En la grandaj kaj mezgrandaj urboj en Nordorienta Ĉinio la forigado de senlaboreco jam grandskale komenciĝis. En kelkaj urboj kiel Mukdeno kaj Port-Arturo kaj Dajren la registrado de senlaboruloj jam finiĝis fundamente. Plejparto el la urboj ĵus eniras la stadion de ĝenerala registrado. Por plene kaj sisteme solvi la problemon de senlaboreco, lokaj Komitatoj de Forigado de Senlaboreco alprenas paŝon fari registradon, ekzamenon de la senlaboruloj kaj doni al ili laboron samtempe. Ĝis nun pli ol 11,000 senokupaj homoj jam ricevis laboron. Al tiuj, kiuj vivis tre mizere sed jam sin registris kiel senlaboruloj kaj ankoraŭ ne ricevis laboron, oni ankaŭ donis subvencion.

KURANTAJ AFEROJ

Pordego de Ĉielpaco

Ŝju Ĉe

En la 1-a de oktobro, la Nacia Tago de la Ĉina Popola Respubliko, kredeble neniu alia urbo en la mondo estas tiel aferoplena kaj gaja kiel la urbo de Pekino, kaj neniu alia loko tiras al si pli da atento ol Tien An Men, la "Pordego de Ĉielpaco," kie Maŭ Ze-tung revuas la grandan paradon.

Tien An Men estas la temo de la nacia emblemo de nova Ĉinio kaj ĝi rajtas esti tia ĉar ĝi estas la naskiĝa loko de nova Ĉinio. En la 4a de majo antaŭ tridek tri jaroj la kolegiaj studentoj en Pekino amasiĝis tie kaj okazigis demonstracian kunvenon por protesti kontraŭ la hontinda akcepto de la Dudek Unu Postuloj de Japanio flanke de la Norda Militista Registaro. Kvankam ĉeestis nur kelkaj miloj da homoj en tiu griza, venta tago, tamen tio estis fajrero kiu ekbruligis la flamon de la kontraŭ-imperiisma kaj kontraŭ-feŭdisma movado kiu baldaŭ disvastiĝis rapide tra la lando. La laboristoj, kamparanoj, komercistoj kaj studentoj en tuta Ĉinio leviĝis kaj por multaj jaroj ili luktadis ĝis la finfina triumfo de ĉina nov-demokratia revolucio. De tiam, kiam ajn okazis patriota movado la popolamasoj en Pekino ĉiam aŭ kunvenis ĉe la Placo de Tien An Men, aŭ marŝis tra ĝi. Kaj ĝuste estis tie sur la balkono de Tien An Men, ke Prezidanto Maŭ Ze-tung proklamis en la 1-a de oktobro 1949 la naskiĝon de la Ĉina Popola Respubliko.

De tiam la granda Tien An Men fariĝis loko de historia signifo al kiu la popolo de Ĉinio donas omaĝon. Multaj vizitantoj kiuj ĵus alvenas al Pekino ĝenerale antaŭ ĉio havigas al si ekrigardon de Tien An Men por percepti la grandiozecon de nova Ĉinio.

Tien An Men estas fakte la bela enirejo kondukanta al la suda pordego de la antaŭa Imperia Palaco kiu estas konata al la okcidentanoj kiel la "Malpermesita Urbo." Ĝi estas alta kaj larĝa kaj sidas en la koro de la urbo superrigardante la ĉefan bulvardon, Ĉan An Kie (Strato de Longa Paco), kiu etendiĝas de okcidento al oriento, kaj la grandan placon en la sudo. La konstruaĵo sur la masiva muro enhavas naŭ grandajn palac-ĉambrojn. La strukturo estas tipo de ĉina arkitekturo kaj ĝi estas tre bela kaj majesta, kun tegmento el or-flavaj tegoloj kiu estigas dolĉan kontraston al la okruaĵaj muroj. La belaj, komplikaj kaj diverskoloraj desegnaĵoj sur la traboj malsupre de la tegmento vere reprezentas la mondfaman metiistecon de la ĉina laboranta popolo.

La placo antaŭ Tien An Men estas unu el la plej grandaj en la mondo. Ĝi povas enteni 300,000 homojn. Depost la liberigo oni jam faris tri grandskalajn pliboniĝojn al la placo. La pavimo estas plifortigita kaj la bulvardo estas plilarĝigita. Monumento por la populaj herooj estas nun konstruata. Antaŭnelonge la municipala registaro forigis la du grandajn masivajn ŝton-pordegojn ĉe la orienta kaj okcidenta finoj de la placo, kiuj super-arkis super Ĉan An Kie. Nun la placo aspektas ankoraŭ multe pli vasta. De malproksime sur la bulvardo oni povas vidi ekstreme belan panoramon—la or-flavan kaj ruĝan Tien An Men kaj la majestan imperi-palaccon fiere starantajn kontraŭ la klara, blua ĉielo.

Trad. I. K.

KURANTAJ AFEROJ

Pac-delegitoj Vizitis Ekspozicion pri Bakteria Milito

120 el la delegitoj de la Packonferenco de la Azia kaj Pacifika Regionoj vizitis je 17. okt. la ekspozicion pri la krimaj agoj de bakteria milito de la Usona registaro. La delegitoj venis el 23 diversaj landoj kaj 4 internaciaj organizoj. Ili havas malsamajn vidpunktojn kaj malsamajn kredojn pri politiko kaj religio. Vidinte la grandkvantaj atestojn pri la bakteria milito fare de la Usona registaro, ili ĉiuj ege indignis pro la nehumanaj kaj frenezaj kruelaĵoj de la Usona imperiismo. Multaj el ili, dum la vizito, zorge notis klarigojn de la faktoj. Ili asertis, ke la atestoj elmontritaj en la ekspozicio havas nerefuteblan sciencan objektecon, kaj ili proponis, ke la dokumentoj kaj fotoĵoj estu grandkvante presataj kaj dissendataj al ĉiuj anguloj de la mondo. En la opinio-libro ili enskribis siajn indignajn riproĉojn kontraŭ la Usona registaro pro ties krimaj agoj, kaj montris simpatian kaj subtenon al la heroaj popoloj de Koreio kaj Ĉinio.

Ĉinia-Ĉilia Komerca Kontrakto Subskribita

Post amikeca intertraktado inter la reprezentantoj de la Ĉina Importa kaj Eksporta Kompanio kaj S-ro Christian Casonava, la reprezentanto de la Ĉilia-Ĉinia Komerca Kompanio, la Ĉinia-Ĉilia Komerca Kontrakto estis subskribita je 23. okt. en Pekino. Tio ĉi estas la unua komerca kontrakto subskribita inter Ĉinio kaj landoj el Latina Ameriko post la Packonferenco de la Azia kaj Pacifika Regionoj.

KURANTAJ AFEROJ

Pacifiko Fariĝis Ponto... (daŭrigo de p. 241)

modesta, ĝentila kaj gastama, nacio kun senlima valoro kaj granda laborforto kaj plena de antikva saĝeco, sed plej grava por ni estas la fakto ke ĝi estas nacia montranta la vojon de libereco por ĉiuj koloniaj kaj satelitaj landoj. Parolante pri ni, la afero, kion ni devas ĝisfunde studi, estas ĝia agrara reformo. Veni ĉi tien estas por ni eniri lernejon tre grandan kaj pompan.

Ni reiros al nia malnova mondo—la mondo putrigita de impeĝismo kaj feŭdaj fortoj—sed ni tenos en nia koro nian memoron pri tiu ĉi nova mondo. Ni ne tenos tiun ĉi belan vidaĵon nur en nia koro, ni sciigos al ĉiuj niaj popolanoj ke ili estas suferantaj la malfeliĉan rezultaton de la milita politiko. Latina Ameriko ne estas obeema sklavo de fremdlandaj kapitalistoj. Tagon post tago ĝi bataladas por paco, nacia liberigo kaj homara feliĉo. Ĝi ankaŭ batalas por kontraŭstari milit-pakton, por repropriigi la naturajn riĉfontojn kaj defendi la nacian kulturon. En tiu ĉi granda movado Ĉinio estas granda kuraĝiga forto. Ĉi tie la trumpeto de la pac-batalantoj sonas laŭte kaj forte. Fine ankoraŭ ion ni volas diri, t.e. ke la eho de la konferenco de la Aziaj kaj Pacifikaj popoloj kuros trans la marojn kaj ĝi aŭdiĝos en ĉiuj Amerikaj urboj kaj vilaĝoj.

Ni solene garantias, ke ni alportos tiun ĉi standardon al niaj popoloj. Ni firme kredas ke ili dediĉos sian forton al la batalado, ke la amikeco inter niaj landoj kaj ĉiuj landoj tra la tuta mondo daŭru eterne.

Trad. Hoz

En majo de 1942, Okamura Neigi, la plej bruta ekzekutisto el la japana invadantaro, centralizis dek diviziojn por entrepreni la senprecedence kruelan forbalaan batalon kontraŭ nia rezistmilita bazo de la centra parto de Hopej-provinco laŭ la tiel nomata fermursieĝa taktiko. La batalo ripetigis ĝis la vintro de la sama jaro. Nia trupeto batalis ĉiudirekte en la multobla ĉirkaŭsieĝo de la malamika armeo. En iu neĝa nokto, ricevinte instrukcion de la supra organizo de la Partio, ke ni "dividiĝu en grupetojn, aktivu kaŝe, ekstermu malgrandajn bandojn de malamikoj kaj atendu favoran tempon por ofensivo", ni tuj eskortis la vunditojn kaj malsanulojn al sekuraj ŝirmejoj kaj dividis la restantajn anojn en sep grupetojn. Ni kaŝis nin en la hejmo de Onjo Ĉen Kin-huej post embuska surprizatako al taĉmento de malamikoj.

Tiaj virinoj, kia Ĉen Kin-huej, vere estis niaj amemaj patrinoj kaj subtenantoj, sen ili ni ne trovus ĉirmejon, kaj tial ŝi fariĝis kvazaŭ najlo en la okulo por la malamikoj. En la sama tago, kiam la patrino de Ma Pen-ĉaj,¹ la gvidanto de la mohametana taĉmento, estis arestita, ankaŭ Ta Ĉenkiaĉuang (la granda vilaĝo de la Ĉen-klano), la vilaĝo kie loĝis Onjo Ĉen, estis ĉirkaŭsieĝata.

La malamikoj pelis la vilaĝanojn en templon ĉe la orienta fino de la vilaĝo, kaj postulis, ke oni liveru al ili Onjon Ĉen, celante al ili per maŝinpafiloj kaj brilantaj bajonetoj. Sed antaŭ la pafilfaŝkoj kaj bajonetoj la vilaĝanoj ne kliniĝis, ĉar ili amis Onjon Ĉen kiel sian patrinon.

Ne sukcesante havigi al si Onjon Ĉen, la malamikoj furiozis ĉirkaŭ la amaso kiel rabiaj hundoj, batante unue la plenaĝulojn kaj poste la infanojn, sed ĉiuj iliaj brutajoj pruviĝis tute vanaj. Nakamoto Tacuo, japana pelotonestro, kromnomata la 'Vivanta Reĝo de Hadeso', 'baga'-adante² direktis la pupo-soldatojn peli la senarmilan amason en la salonegon de la templo, ŝtopi la pordon kaj la fenestrojn kaj ekbruligi la konstruaĵon. Ĉirkaŭata de densa fumo kaj fajra maro, la homoj plurfoje rompis la pordon kaj ĵetis sin eksteren spite al la malamikaj bajonetoj. Nakamoto Tacuo, la japana faŝistbandito eĉ elĵetis venenan gason kontraŭ la amaso; en la flava fumo simila al densa nebulo estis vidita ke plenaĝuloj kaj infanoj falas baraktante sur la teron unu post alia. Ĉen Kin-ĉen, bofratino de Ĉen Kin-huej, prezidantino de la virina asocio en la vilaĝo, eksaltis el la dense densa amaso kaj kaptis la pafilon de malamiko, kriante: "Mi estas Ĉen Kin-huej kaj pri ĉio mi respondas, rapide ĉesigu la venenan gason, vi brutidoj!"

La malamikoj aŭdinte ke Ĉen Kin-huej estas trovita, tuj malfermis la templan pordon; la amaso ĵetiĝis eksteren hurlante. Iu tiris ŝin flanken, la aliaj ĉirkaŭis ŝin kaj ŝi denove dronis en la amaso. Pro la ĥaosa tumulto de la homamaso la diablidoj ne vidis ŝin klare kiam ŝi elpaŝis antaŭ nelonge, tial ili refoje ĉirkaŭsieĝis la amason kaj devigis ĝin elliveri Ĉen Kin-huej.

La interpretisto—ulo okulvitrita kun fizionomio tre simila al la japanaj diablidoj—demandis ruze ridante kun ŝtelista vizaĝoesprimo: "Kiu estas Ĉen Kin-huej? Elpaŝu! Alie lia moŝto sendos vin ĉiujn en la inferon!" Iu infano en la amaso ekparolis kuraĝe: "Ĉu vi estas ĉino? Sensanga kaj senkarna hundaĉo!" La interpretisto elstarigis siajn strigajn okulojn kaj volis eksplodi de

Liu Vej-ĉen

furiozo, sed post konsidero li surmetis hipokrite afablan mienon kaj diris al la homoj dolĉajn vortojn: "Liveru Ĉen Kin-huej kaj vi estos pardonitaj, alie neniu el vi povos vivi." Oni ne ĵetis al li eĉ rigardon

malgraŭ liaj minacoj kaj allogoj. Tiu perfida hundaĉo ne ĉesis tedi la statusimilajn homojn ĝis la 'Vivanta Reĝo de Hadeso' 'baga'-adante lupblekante alsaltis kaj forigis lin per piedbato. Nur tiam li ŝteliris flanken.

La 'Vivanta Reĝo de la Hadeso' elprenis sian sabron kaj trapikis blankbarbulon je la koro, la sango surŝprucis la tutan diablan vizaĝon kaj li forviŝis ĝin kun embaraso. Subite Ĉen Kin-ĉen denove elsaltis kaj celis per fingro al Okamoto Tacuo kriante: "Ĉu vi serĉas Ĉen Kin-huejn? Jen mi estas!"

Kvazaŭ trovante trezoron, Okamoto Tacuo ridis malice, ŝin trenis sur veturilon kaj eskortis al sia ĉefkvartiro.

En la ĉefkvartiro, la malamikoj per bajoneto celis ŝian bruston kun malica rideto kaj premis ĉiam pli forte ke la pinto iris iom post iom pli profunden. Ili ankaŭ vipis ŝin per kanabŝnuro trempita en gluo, tiel ke la tuta korpo estis kovrita de ŝirvundoj. Krome ili instigis kvar sanghundojn mordi ŝin kaj trametis ŝnuron sub ŝia klaviklon. Sed la sola respondo, kiun la malamikoj ricevis, estis: "Vi volas scii kie troviĝas la distrikta pelotono, la gubernia bataliono kaj ankaŭ la korpuso? Jes, mi bone scias kie ili estas, sed ne diros al vi!" La malamikoj uzis ĉiajn kruelajn metodojn ĝis fine mortis Onjo Ĉen Kin-ĉen sub la torturoj, sed eĉ hareton de la batalantoj de Centra Hopej ili ne sukcesis eltrovi.

Antaŭ ol la malamikoj ĉirkaŭsieĝis la vilaĝon, Onjo Ĉen—t.e. Ĉen Kin-huej—jam estis foreskortita de vilaĝaj kadroj al alia vilaĝo.

II

Malmulte da tagoj poste, en la antaŭvespero de la novjaro laŭ la luna kalendaro, kamarado Laŭ Hung, vilaĝa kadro, kuris hastege en la sidejon de la pelotono. Li kriis konfuziĝe antaŭ ol li transpaŝis la sojlon: "Ho ve! Plu vivi—oni jam ne povos!" Kiam mi kaj Pelotonestro Ĉen iris renkonte al li, bruspirante li venigis nin al senhoma angulo kaj donis al ni la sekvantan informon kun mallaŭtigita voĉo:

"Alivestinte sin kiel flor-vendistino, Onjo Ĉen ŝteliris en la urbon kaj trovis la kadavron de Ĉen Kin-ĉen en la Templo de la Urba Dio. Ĉe la patrino onklino de Siaŭ (juna) Li, ŝi renkontis Liu Kaj-ŝan, la interrilatliganton,³ kiu diris, ke la malamikoj intencas okupi Ta Ĉenkiaĉuang. Aŭdinte tiun malbonan novaĵon ŝi tuj rapidis hejmen sen manĝo. Hodiaŭ nokte, spite al la furioza kontraŭa ventego ŝi kuris kvardek li'ojn⁴ kaj atingis la vilaĝon nur en la noktomezo. Transpaŝinte mian sojlon ŝi kvazaŭ paralizigis. Oni ne sciis kiom longe si rampis, sed nur vidis ke ŝiaj manoj kaj genuoj estas tute kovritaj de sango! Mi portis ŝin surdorse al la terlito, demetis de siaj piedoj la ŝiritajn kaj sangsaturitajn ŝtrumpojn kaj volis venigi la kuraciston. Sed ŝi diris: 'Ne, unu sekundo de prokrasto pereigus senombrajn homojn!' Ŝi petis min tuj vin informi. Eltrovu rimedon rapide, aŭ ekspedu leteron al la gubernia komisaro, oni neniel povas lasi la diablidojn nin sufoki en la interkurbo de Fujung-rivero. Se ni volas vivi, ni devas eltrovi kontraŭrimedon!..."

Tion aŭdinte mi kaj Laŭ Ĉen tuj faris urĝan raporton sen plua pridemando kaj sendis Siaŭ Li—filo

de Onjo Ĉen—la komunikiston, porti ĝin al la gubernia komisararo tuj dumnokte. Siaŭ li, surmetinte sian terkoloran veston por nokta irado,⁵ kaŝis la leteron en la sino, prenis revolveron kaj forkuris ventfluge.

Kun brovoj kuntiritaj Laŭ Ĉen parolis meditante: “Kiel aŭdacaj la hundaĉoj! Ili eĉ kuraĝas ‘profunde enpenetri kun sola glavo!’ Bone ni mezuru nian forton kun la hundaĉoj!” Ni triope, ĉiu ĉirkaŭprenante la genuon per ambaŭ manoj kun klinita kapo cerbumis seninterrompe pri kontraŭrimedo ĝis la mateno. Kiam la suna lumo pentris la fenestran paperon tute ruĝa, Laŭ Ĉen metis sian brakon ĉirkaŭ mian kolon kun rideto, premis sian buŝon al mia orelo kaj flustris. Poste li laŭtigis sian voĉon dirante: “Bone konsideru kun Laŭ Hung, ĉu ekzistas ia truo en mia plano?” Laŭ Hung gapis kun grande malfermitaj okuloj kaj piedfrapis la teron pro senpacienco. Mi ankaŭ metis mian brakon ĉirkaŭ lian kolon kaj diris al li la ideon de Laŭ Ĉen. Li pensis gapante minutojn kaj poste diris kun manĝestoj: “Tre bone! Tre bone! Tion farante ni sendube metos finon al la vivo de la ‘Vivanta Reĝo de Hadeso!’”

Ni zorge konsideris ĝis la tagmezo kiam ni tute samopiniis pri ĉio, de la principo ĝis la detaloj. Tiam Laŭ Hung, kun plena fido pri la sukceso, forkuris serĉi Onjon Ĉen, la vilaĝan kadraron kaj la milicianojn por fari preparadon.

Kiam mi disfaldis la karton de la subteraj vojoj de Ta Ĉenkiaĉuang kaj interkonsiliĝis kun Laŭ Ĉen pri la teknikaj detaloj dum la batalo, Onjo Ĉen ekvokis min per la nomo kaj enkondukante grandan knabinon de ĉirkaŭ 17 jaroj, diris ridetante: “Rigardu, Liu Ĉiang, ĉu vi konas ŝin? Jen via fianĉino!”

Ekzamenante dum momento mi simple trovis ŝin bone konata laŭ aspekto sed ne memoris en kiu vilaĝo ŝi vivas. Ŝi vestis sin per blua vatita ĵaketo kun desegno de malgrandaj florrondoj kaj vatita pantalone el blua maldelikata ŝtofo. Ŝiaj blanketaj vangoj ruĝiĝis pro la frosto. Laŭ Ĉen kredis ke ŝi estas sendito el la vilaĝo portanta al ni informon kaj demandis senkonsidere: “Ĉu estas ia novaĵo?” Ŝi turnis sin dorsen kaj kaŝridetis. Poste ŝi returnis sin al ni, iom premante la bluan viŝtukon sur la kapo, kaj glatigante la ĉetempian nigran hararon, diris malrapide: “Jes, jen letero al la pelotonestro kaj la politika komisararo.” Parolante ŝi rapide elprenis plenmanon da ruĝaj jujuboj el la sino. Ŝi elektis unu el ili, ĝin pinĉe duigis per la fingroj kaj elprenis collongan kuntordadon de blanka papero. Maltordante la paperaĵon ŝi parolis kun delikata voĉo: “Jen letero de la gubernia komisararo...” Legante la leteron, Laŭ Ĉen ekridetis kaj aprobis kun ĝojo.

Kiam mi estis pensanta ĉu akcidento okazis al Siaŭ Li, kial li ne revenas, la granda knabino jam ŝirmis sian vizaĝon per manplatô kaj ne povis reteni sin de rido. La rido ne similis al la virina. Onjo Ĉen refoje ŝercis kun mi: “Ŝi ne forlasos vin, Laŭ Liu, ŝi akompanos vin tage kaj nokte kaj batalos kune kun vi kontraŭ la japanaj diablidoj, haha!” La knabino deŝiris la surkapan viŝtukon kaj malkovris la nigran perukon. Estis ja Siaŭ Li mem. Nun li ne plu sajnigis la virinan voĉtonon, sed diris tute laŭte: “Pelotonestro kaj politika komisararo, se mi ne alivestis min, mi povis nek iri, nek reveni. La gubernia komisararo ordonis min tuj returniĝi dumtage. Sed mi devis preterpasi tridek ok gardturojn sur la vojo. La hundaĉoj certe ĉasus min per pafoj, se mi ne alivestus min!”

Onjo Ĉen refoje ridadis, sed diris poste kun serioziĝinta mieno: “Ho, Laŭ Liu, oni interkonsiliĝis en

la vilaĝo kaj decidis forkaŝi ĉiujn manĝprovizaĵon, brutaron kaj aliajn proprajojn, kaj restigi ĉirkaŭ dudek maljunulojn por akcepti la malamikojn. Mi opinias ke mi prefere restu hejme. Se vi maltrankvilos pri mi, mi alivestos min.”

Mi kaj Laŭ Ĉen ne konsentis ŝian restadon sed ŝi petis insiste ĉar ŝi ne povos resti trankvila pri ni dum sia forestado. Fine ni konsentis pri ŝia insista petado, cetere Laŭ Hung jam cedis antaŭe.

“Mi iras interkonsiliĝi kun la maljunula grupo,” diris Onjo Ĉen kaj tuj turnis sin por foriri. Vidante ke ŝia busto ŝanceliĝas kvazaŭ ŝi irus sur dornoj, mia koro ekdoloris, memorante ke ŝi havas ankoraŭ haŭtvezikojn sub la plandoj. Mi elprenis jodan tinkturon kaj kotonon el la aktaĵo kaj sendis Siaŭ Li post lia patrino por doni ilin al ŝi. Kio plej maltrankviligis nin estis la malamikoj de Ĉiaŭtoŭ-urbeto, kiu situis nur dek du li-ojn for de Ta Ĉenkiaĉuang kaj la aŭtomobiloj malamikaj povis nin atingi laŭlonge de la Fujung-rivera digvojo duonhoron post la aŭdiĝo de pafado. En la urĝa raporto kiun Siaŭ Li portis al la gubernia komisararo, ni jam sugestis, ke se la gubernia bataliono prenis sur sin la respondecon malhelpi la malamikojn de Ĉiaŭtoŭ-urbeto per embuska atako, nia venko estus certa. La respondo konsentis nian opinion kaj diris ke oni sendos parton de la gubernia bataliono al ni por batali kune kontraŭ la malamikoj de Ta Ĉenkiaĉuang kaj alia pli granda trupo (la 23a regimento kaj parto de la gubernia bataliono) sieĝatakos la malamikojn de Ĉiaŭtoŭ-urbeto.

III

Tiu tago estis la dek kvina de la unua monato laŭ la luna kalendaro. La nubkovrita ĉielo aspektis kiel fero. Pluvetis dense. Viroj kaj virinoj, plenaĝuloj kaj infanoj, la tuta vilaĝa loĝantaro rifuĝis al najbaraj vilaĝoj, kondukante siajn brutĉarojn.

Pelotonestro Ĉen sidis sur la fenestra breto kun volumo de ‘Gerila Batalo’ en la mano kaj faris notojn dum la legado. Mia tasko antaŭe asignita estas paroli kun la komunistoj-pelotonanoj unu post alia.

“Alvenis la diablidoj!” Onjo Ĉen enkuris kriante kaj post ŝi envenis Laŭ Hung kun duonsako da manĝgrendoj.

Forviŝante la pluvogutojn de sur la kapo Onjo Ĉen aldonis haste: “Rapidu! Rapidu! Rajdantaj soldatoj kaj aŭtoj jam ĉirkaŭsieĝis nian vilaĝon!”

Mi malfermis la aperturon de la subtera kaverno kaj ordonis Siaŭ Li, ke li unue portu la partiajn dokumentojn en la kavernon. Onjo Ĉen tiel okupiĝis konfuzite, ke ŝi jen kaŝis la aĵojn por ni jen forbalais la folietojn de paperaĉo sur la tero, jen forfrotis la blujn ink-makulojn sur la muro kaj tablo per malsekigita tuko. Dume la mangrenadojn, faskon de hakiloj kiu kuŝis sub la ŝranko, niajn manĝo-provizon kaj litaĵojn, ĉion portis Laŭ Hung en la subterejon unu post alia.

Ni supozis ke la malamikoj nepre prenos por sia ĉefkvartiro tiun ĉi grandan brikmasonitan domaron (la hejmo de elmigrinta bienulo, Ĉen Vang-tien), en kiu ni loĝis tiam. Nia subtera reduto ĝuste situis tie. Tiun labirintan, akvo- kaj fajrorezistan reduton kun batal ekipaĵoj ni povis profiti por ekstermi la malamikojn.

Ni grimpis sur la tegmenton de la norda domo kaj rigardis ekster la vilaĝon. La malamikoj alŝoviĝis el ĉiuj direktoj kiel ondaro tra la grenkampoj al la vilaĝa rando.

Laŭ Ĉen svingis la pafilon kaj diris decideme: “Tiel ne povas esti! Antaŭ ĉio ellasu leterkolombon por

doni informon al la gubernia komisaro, kaj poste lasu la batal-grupetojn malsupreniri unue.” Mi malsupren iris kun Laŭ Hung de la tegmento per ŝtupetaro kaj ordonis Siaŭ Li ellasi la grizan kolombon kiun ni portis ĉe ni. Ĝi pafiĝis al la firmamento kun la zumado de ventfajfilo.

Kiam ni kaj Laŭ Ĉen eniris la domon, ni vidis, ke Onjo Ĉen kaj Laŭ Hung jam aranĝis la ĉambron kaj la meblojn en bona ordo, kun felto sternita, litaĵoj kunfalditaj sur la terlito kaj kurteno antaŭ la fenestro... Laŭ Hung ridis al mi dirante: “Ĉu bone? Ĉu vi kredas ke la ‘Vivanta Reĝo de Hadeso’ prenos sian loĝejon ĉi tie?” Mi kapjesis ridante: “Pendigu ankoraŭ kelke da kromolitografiaj virino-portretoj de Ĉen Vang-tien...” Sed Onjo Ĉen maltrankviligis kaj urĝis nin: “Iru malsupren en la subteran vojon! La virinportretojn mi jam pretigis!” Ni tuj turnis nin kaj iris en la subteran vojon. Onjo Ĉen kovris atente la aperturon de la subtera vojo en kuir-kameno, surmetis kadronon kaj plenigis ĝin per akvo.

Post momento Onjo Ĉen frapis ĉe la kadrona rando. Mi rampis al la aerumejo kaj aŭdis, ke ŝi diras: “La hundaĉoj suriras la domojn, nun ili frapis la pordon de ĉiu domo laŭvice, transgimpis la murojn kaj penetris perforte en la kortojn!” Tuj poste la bruo de pordo-frapado, de ĉevalhufoj kaj ledaj ŝuoj jam formis haosan tumulton.

Denove tintis la kadrona rando. Tio estas sekreta signalo, kiu signifis ke Onjo Ĉen jam foriros. Laŭ Ĉen kunvokis la grupetestrojn kaj batalantojn por batalpreparado. Laŭ Hung disdonis hakilojn al la batalantoj. Mi kaj Siaŭ Li iris al la antaŭe difinita loko por atendi la informon de Onjo Ĉen.

Mi elrampis la sekretan aperturon ekster la vilaĝo kun Siaŭ Li. La ĉielo estis inke nigra, la pluveto jam fariĝis pluvego kaj ankaŭ la vento plifurioziĝis kirlecirkle. Mi kaj Siaŭ Li iris kune brakon sub brako al la mezo de la fruktarbarejo, pene malfermis la okulojn, iris palpante ĝis la dika pirarbo kaj fine trovis la ŝtonan tablon. Certiginte ke tiu estas la loko antaŭe difinita, ni kaŭris senĝene sub la pirarbo atendante la alvenon de Onjo Ĉen.

Pasis tempodaŭro de unu manĝo, subite preterflugis aro da fazanoj klukante sub la vipado de la ŝtormo. Ankoraŭ pasis iom da tempo, iu ombro aperis antaŭ ni. Ni sciis ke tiu estas Onjo Ĉen. Ni iris renkonte al ŝi kaj ŝin subtenante sub la brakoj ni iris kune al senhoma dometo en la ĝardeno. Siaŭ Li garde patrolis ekstere. Onjo Ĉen flustris al mi: “Laŭ Liu ekagu frue! Kiam venos la tagiĝo, ĉio estos renversita! Apenaŭ veninte en la vilaĝon, la Vivanta Reĝo de Hadeso senkapigis tri maljunulojn kaj pendigis surŝnure dek du aliajn. Eĉ la patro de Laŭ Hung estas forte timigita kaj ne kuraĝas lin renkonti. La diablidoj postulas vinon de ili. Mi prenis tiun ĉi botelon pretekstante serĉi vinon kaj ŝteliris el la vilaĝo. Ĉe la rando de la vilaĝo ne troviĝas gardstarantoj. La diablidaj sentineloj staras sur la tegmento de la norda domo de la loĝejo de Ĉen Vang-tien, kaj sur la tegmento de la suda domo ĉe la ekstera korto gardstaras pupsoldatoj. Mi kalkulis entute kvardek japanajn diablidojn kaj cent kvindek ok pupsoldatojn...” Ŝi prenis mian manon kaj premis sian buŝon al mia orelo treme spiregante: “Enveninte la vilaĝon la diablidoj tuj ĉie traserĉis. Unue ili faligis la pirarbojn ĉe la vilaĝa rando. Ĉiujn meblojn, litaĵojn kaj vestaĵojn ili forrabis kaj kunligis en amasojn kaj lokis ilin sur la tegmentoj de la domoj de Ĉen Vang-

tien kiel barikadon dum la batalo. Kokojn kaj anasojn ankaŭ estas forkaptitaj kaj estos tute formanĝitaj. Komence la vilaĝestro rilatiĝis ankoraŭ sufiĉe bone kun la diablidoj. Sed jen ektroviĝis lia fatala malamiko, Sun Dua la testudido, kiu estas ĵurita frato de Ĉen Vang-tien kaj nepo de la milionulo Sun. Li havas kromnomon ĉe Ĉiaŭtoŭ-urbeto ‘La Teruro de Ambaŭ Homa kaj Transa Mondo’. Li povas paroli japanan lingvaĉon kaj nun servas al la diablidoj.” Mi eksentis, ke du varmaj larmoj falas sur mian nukon. Onjo Ĉen singultis iom, sed tuj retenis sin aldonante: “Sun Dua ĉirkaŭligis la vilaĝestron propramane kaj pendigis lin kapaltere en la ĉevalstalo de Ĉen Vang-tien. Tiam mi kuiris manĝaĵon por la diablidoj. Mi aŭdis ke Sun Dua vipas la vilaĝestron per ĉevalvipo kaj demandis: ‘Kiuj estas kómunistoj? Kiuj estas milicanoj? Kie vi enterigis la publikan grenon? Kien forkuris la distrikta pelotono?..’ Li demandis pri ĉio ĉe nia flanko kaj preterlasis nenion. La vilaĝestro estas inda homo kaj eldiris nenion ĝis la fino. Sun Dua batis lin rekte ĝis morto kaj ankoraŭ freneze batadis. Eĉ tio ne kvietigis lian koleron; li elpikis liajn okulojn kaj eltranĉis la karnon de liaj piedplatoj per tranĉilo. Mi ŝajnis porti manĝaĵon al ili por rigardi la vilaĝestron kaj vidis, ke lia tuta korpo estas banata en sango!” Onjo Ĉen denove emis plori. Mi subtenis ŝin sub la brako. Kvankam ŝi retenis sin de plorado, sed ŝia voĉo tremis ankoraŭ pli forte. Ŝi daŭrigis: “La diablida maŝinpaŝilo staras sur la tegmento de la norda domo. La ‘Vivanta Reĝo de Hadeso’ loĝas en la ĉambro kie vi kaj Laŭ Ĉen loĝis. Kun li loĝas Sun Dua, lia interpretisto kaj kvin korp-gardistoj, ĉiuj armitaj de japana revolvero. En la orienta kaj okcidenta flankĉambroj loĝas entute tridek kvar, ĉiuj estas japanoj kaj dormas sur manĝotabloj kiel mortaj porkoj. Ne troviĝas gardstarantoj sur la tero. Ĉiuj estas sur la tegmentoj. Sun Dua, la testudido kredis, ke mi estas vera domgardistino de Ĉen Vang-tien kaj amasigis ĉion, kion ili rabis de nia vilaĝo, en la flankĉambron de la ekstera korto, kie mi loĝas...”

Mi rigardis al la lumhorloĝo kaj trovis ke estas jam la dekdua. Mi adiaŭis Onjon Ĉen kaj volis foriri. Onjo Ĉen dekorkis la botelon kaj donis al mi kelkajn tirojn da alkoholaĵo. Ŝi refoje premis mian brakon kaj ripetis kun plora voĉo: “Ne lasu la ‘Vivantan Reĝon de Hadeso’ kaj Sun Duan eskapi!” Tiam ŝi plena de venĝemo forlasis nin kaj reiris al la tigra faŭko spite al la ŝtormo.

Mi palpe iris kun Siaŭ Li ĝis iu puto—tiu estis la ekstervilaĝa aperturo de la subtera vojo. Siaŭ Li staris ĉe la putrando kaj imitis fazanan klukadon kelkfoje, tiam knaris la sekreta pordo en la puto. Siaŭ Li rampis surventre, etendis sian kapon trans la putrandon kaj faris signalon al la personoj malsupre. Jen oni apogis tabulon sur fendo de la ŝtona muro de la puto por nin malsuprenirigi. Ni reiris al la kaŝita ĉambro, kie ni kunsidis antaŭ nelonge, kaj trovis Laŭ Ĉen tie.

Tiumomente la batalantoj, kun hakilo en la mano, estis interparolantaj flustre kun kunpremitaj dentoj kaj mangestoj; ili eble babilis pri la batalo aŭ akuzis la krimagojn de la diablidoj. Mi sciigis al ili la informon ricevita de Onjo Ĉen kaj la morton de Laŭ Van, la vilaĝestro. Kun ruĝiĝantaj okuloj Laŭ Ĉen ordonis Siaŭ Li: “Tuj disdonu la ordonon ke ĉiu portu hakilon, mangrenadojn kaj pistolon, formetu la longan pafilon. Du homoj el ĉiu subpelotono restu por gardo kaj ĉiuj aliaj estu pretaj je batalo!” Siaŭ Li respondis “jes” mallaŭte sed emfaze. Li for pafiĝis kiel serpento.

Laŭ Ĉen estis tiel indignigita ke liaj okulgloboj preskaŭ elsaltus, malbenante: "Ili ja estas vere niaj malamikoj!" Poste li diris al mi mallaŭte: "Jam iru! Mi kondukos vin tien por vidi Sun Duan kaj la 'Vivantan Reĝon de Hadeso'."

(daŭrigota)

Elĉinigi S. J. Hsu

Rimarkoj:

1. *Dum la Rezistmilito, en Centra Hopej estis organizita kontraŭjapana trupo el mohametanoj kun la nomo de 'Hohametana Taĉmento', kiu batalis tre brave. La malamikoj ne trovis pli efikan rimedon venĝi sin, de ili arestis la patrino de Ma Pen-ĉaj, ĝia gvidanto, kaj torturis ŝin per ĉiuspecaj kruelaĵoj por eldevigi sekreton de ŝi kaj devigis ŝin persvadi sian filon kapitulaci. Sed ŝi rifuzis malcedi kaj estas murdita de la malamikoj.—R. de aŭtoro.*
2. *Baga: japanlingve signifas 'stultulo'.*
3. *Interrilatiganto estis persono kiu respondis al la postuloj de la okupantoj en ĉiu vilaĝo. Li estis sub nia dispono kaj profitante la laŭleĝan pozicion kolektis informojn pri la malamikoj.—R. de aŭtoro.*
4. *Unu li=½ kilometro.*
5. *Ĉar la vesto estis terkolora kaj estis malfacile ĝin distingi en la nokto, tial oni tiel nomis ĝin.—R. de la aŭtoro.*

Alvoko al la Popoloj Tutmondaj

(daŭrigo de p. 240)

tiuĝn agojn de sia registaro kaj konduki sian landon sur pacan vojton.

La Packonferenco de la Azia kaj Pacifika Regionoj salutas la Usonan popolon, kiu la pacon porbatalas en grandegaj malfaciloj. Ni esperas, ke la Usona popolo intensigos sian bataladon kaj plifortigos sian unuigon por la defendo de paco. Ni bondeziras al ili sukceson en tiu nobla laboro kaj etendas al ili niajn amikajn manojn.

Ni komprenas, ke la japana popolo terure suferas sub la premado de la Usonaj okupantoj kaj la militaristaj regantoj enlandaj. Ni kredas, ke ili certe staros kune kun la ceteraj popoloj de la Azia kaj Pacifika regionoj kaj batalos por la nacia sendependeco kaj por ne fariĝi kanono-furaĝoj. La popoloj de la Azia kaj Pacifika regionoj tutforte subtenos la japanan popolon en ilia heroa batalado por pacdefendo kaj sendependeco. Ni bondeziras al ili sukceson kaj etendas al ili niajn amikajn manojn.

La monstraj kruelaĵoj, kiuj akompanas la nunan militon, jam incitas al ĉiuj bonvolaj geviroj la konsciencon. La grandamasa buĉado al popolanoj, freneza detruado al pacaj urboj kaj vilaĝoj kaj senekzempla teruro altrudita al senkulpaj virinoj kaj infanoj, ĉio ĉi faras la modernan militon ĉioneniiga instrumento. La krimagoj de masakro al samgentuloj per la plej kruelaj armiloj inventitaj de homoj mem, minacas devastiĝi al aliaj lokoj kaj popoloj. Se ni ne volas lasi radikale nuliĝi la miljarajn kulturajn atingajojn, lasi la vivon fariĝi besta batalo por ekzistado, kaj se ni ankoraŭ volas konservi iom da humaneco en la vivo, ni do devas haltigi la sangajn krimagojn en Koreio, Vietnamo, Malajo kaj aliaj landoj. La tragedia perspektivo de nova milito endanĝerigas la vivon de ĉiuj geviroj kaj infanoj. Tial, batali por paco kaj por haltigi la

drivon de la mondo al milito estas nia komuna devo. La popoloj de la Azia kaj Pacifika regionoj firmvole decidis batali senkompate kontraŭ la fortoj de milito, kaj firme kredas, ke kunlaborante kun ĉiuj homoj de bona volo, ili certe povos eviti la minacantan katastrofon, forigi la nigrajn nubojn de milito kaj klarigi la homan vidon, por bonvenigi la aŭroron de universala amikeco kaj daŭra paco.

Pekino, la 12-an de oktobro, 1952.

Popola Edukado en Pasintaj Tri Jaroj

(daŭrigo de p. 247)

kun la lastjara, oni vidas ke la salajroj de altlernejaj instruistoj pliiĝas 18.6 procente; tiuj de mezlernejaj instruistoj, 25.5 procente; kaj tiuj de elementlernejaj instruistoj, 37.4 procente. Samtempe, la popola lernosubvencio por la lernantoj en lernejoj mezgradaj kaj pli superaj estas grandkvante plimultigita. Cent procentoj de la lernantoj en la mezgradaj teknikaj lernejoj, instruistaj lernejoj kaj altgradaj lernejoj ĉiumonate povas ricevi la popolan lernosubvencion, kaj laboristakampana kadro aŭ industria laboristo kiuj eniras en lernejon povas ĉiumonate ricevi pli multe da popola lernosubvencio. Tiamaniere ne nur la manĝo-pago de ĉiuj lernantoj en mezgradaj teknikaj lernejoj, instruistaj lernejoj kaj altgradaj lernejoj estas liverata de la ŝtato, sed ankaŭ la problemoj de iliaj aliaj vivkostoj povas esti solvitaj. Sekve la nuntempaj lernantoj kaj instruistoj povas senzorge kaj trankvile lerni kaj labori por la konstruado de la patrio, por la bono de la popolo kaj por la pli bela estonto de la homaro.

En la pasintaj tri jaroj, ni jam radikale ŝanĝis la duonkolonian, duonfeŭdan situacion de edukado de malnova Ĉinio. La edukaj organizoj kaj eduka laboro de la tuta lando jam senescepte apartenas al la popolo kaj fariĝis ilo por servi al la popolo. Tio ankaŭ instigas radikalan ŝanĝon en la spirita vivo de la tutlanda popolo. Ĉiu ajn ordinara popolano konas klare kiu estas la plej furioza malamiko de la ĉina popolo kaj kiu la plej sincera amiko. Kontraŭbatali la agreson de imperiismo, kontraŭbatali la reakcian feŭdan influon, unuigi kun la internaciaj amikoj, krei per sia propra laboro sendependan, pacan, demokratan, liberan kaj feliĉan vivon—tiaj ideoj, tiaj kredoj, jam enradikiĝis en la koro de la vasta popolo. Miloj kaj dek miloj da ĝis nun analfabetaj laboristoj, kamparanoj kaj laborantaj virinoj povas hodiaŭ legi tagjurnalojn kaj librojn kaj multe partoprenas sociajn agadojn. Dekmiloj da altgradaj konstruaj laborantoj kaj centmiloj da mezgradaj konstruaj laborantoj jam gradiĝis el la lernejoj kaj sub la unuigita distribuo de la Popola Registaro laŭ la bezono de la nacio kaj laŭ ilia kapablo volonte iris al la diversaj konstruaj postenoj de la patrio. La abunda kreemo de la liberigita ĉina popolo akiris liberan disvolvon kaj herooj kaj modeloj ĉie aperadis.

En la pasintaj tri jaroj, la atingajoj en la paca, konstrua laboro, pri kiu klopodas la kreemo de centoj da milionoj da organizitaj popolanoj, estis mirindaj. La epoko de malnova Ĉinio, kiam la imperiistoj kaj la reakciaj regantoj propramane fabrikis la "malriĉecon" kaj "malklerecon" de la ĉina popolo, tamen samtempe mokis la "kulturan postigintecon" de la ĉina popolo, jam neniam revenos.

Trad. Nojo Lo



PROTESTO EL D.D.R. KONTRAŬ BAKTERIA MILITO

Karaj ĉinaj amikoj!

La tuta pacamanta mondo protestas kontraŭ la krima apliko de malhoma bakteria milito en Koreio kaj ankaŭ en nordorienta Ĉinio. Ankaŭ en nia lando oni protestas en multaj kunvenoj kontraŭ la krimoj de sangsoifaj Usonaj imperiistoj.

Ĉiuj pacamantaj homoj, batalantaj streĉe en la granda fronto de tutmonda pactendaro scias, ke malgraŭ la pezaj bombardoj la krimaj agresantoj malsukcesis kontraŭ la heroaj ĉinaj kaj koreaj l.berebatalantoj. Pro tio ili aplikas nun pestbakteriojn por ekstermi la koreajn kaj ĉinajn batalantojn. Tiu pestmilito signifas grandan moralan malforton de Usona imperiismo. La mortaj malamikoj de la homaro fiaskos ĝuste kiel la besta hitlera faŝismo.

Neniaj insektoj detruos tian popolon kiel la ĉinan kaj korean.

Pestitaj puloj kaj aliaj insektoj ankaŭ ne helpas eviti al imperiistoj la malvenkon. La homa justo estas ĉe la heroaj batalantoj de Ĉinio kaj Koreio. Via alvoko al ĉiuj pacamaj popoloj tra la tuta mondo tuj sin mobilizi pro la civilizacio kaj justeco kaj haltigi la teruran krimagon de la Usonaj agresantoj grandskale uzi bakterian militon en Koreio estas aŭdita. De post longa tempo la internacia preso publikas pri la krima pesta milito kaj protestas kaj batalas kontraŭ tiuj hommalamikoj.

Precipe la granda Sovetio, kiu ankaŭ luktas por kreo de demokrata pacamanta Germanio (Tutgermanio), estas pioniro de pacbatalanto kaj protestis en multaj kunvenoj sed ankaŭ la popoldemokratioj. La duan Koreion planas la imperiistoj en nia lando. Ni streĉe batalas kune kun vi por venki la rabistojn.

Via germana k-do Ehmig

JAPANA POPOLO KLOPODAS POR VERA PACO

Karaj gekamaradoj en la Packonferenco de Azia kaj Pacifika Regionoj!!

Ni elkore salutas vin ĉiujn kun sincera frata amikeco, kaj deziras sukceson al tiu ĉi signifoplena konferenco.

Ankaŭ en nia lando popolo aprobis la alvokon de la Prepara Konferenco, kaj multaj pacamantoj estis elektitaj kiel reprezentantoj al la Pac-konferenco en Pekino. Sed, malaminda faŝista Joŝida Registaro ĉi-foje ankaŭ ne donas permeson vojaĝi al Pekino, tiel same kiel ĉe la antaŭa Moskva Ekonomia Konferenco.

Tiu fakto montras ke Joŝida Registaro timas la Pac-konferencon, ĉar ili ne volas PACON! Ili ofte diras ke la paco estas minacata de komunistaj landoj, kaj Japanio devas rearmiti sin. Sed, nun ilia mensogo estas rompita! Se ili vere volas pacon, do kial ili devas malpermesi partoprenon al la Packonferenco?! Ja, ili mem estas pacminacantoj!

Sub ĉi tia cirkonstanco, estus ne eble partopreni la japanaj reprezentantoj al la Packonferenco. (Tamen malgraŭ ĉiaj malhelpoj la japanaj reprezentantoj sukcesis ĉeesti la Pac-konferencon—red.) Sed, vi ĉiuj sciuj ke japana popolo elkore deziregas mondpacon! Ni jam spertis mize-

regon de Atombomboj en Hiroŝima kaj Nagasaki. Tiuj du Atombomboj devas esti la lastaj en la historio de la homaro. Atomforto devas servi ne por milito, sed por la PACO!

Antaŭ unu jaro, en San Francisco, Joŝida subskribis traktaton nomitan "PACTRAKTATO". Jam pasis unu jaro, kaj ĉu ĝi alportis veran pacon al Japanio? Ne! Ne! Multaj landoj en Azio ankoraŭ ne eniras en pacan rilaton kun Japanio. Pactraktato en San Francisco estas nur unuflanka!! Kaj ĉu ĝi alportis sendependecon al Japanio? Ne! Ne! Dum pasinta unu jaro la Usonaj militbazoj en Japanio plimultiĝis kaj pligrandiĝis. Usona armeo okupas eĉ la simblon montegon de Japanio —"Mt. Fuĝi".

Por la mondpaço, Japanio devas havi pacan rilaton antaŭ ĉio kun najbaraj landoj en Azio, kaj ĉiuj eksterlandaj armeoj devas retiriĝi el Japanio. Tion ni japana popolo opinias kaj postulas kaj por tio bataladas.

Karaj gekamaradoj ĉe la Packonferenco de Azia kaj Pacifika regionoj! Bonvole sciu ke ni japana popolo elkore sincere deziras PACON, kaj por ĝin gajni klopodas! Ni tutkore esperas gloran sukceson de la Packonferenco!

Kun amikeca manpremo,
tute via

Esperanto Grupo en
K. U. el Japanio

KURANTAJ AFEROJ

Neniigo de Analfabeteco

Kunsido de neniigo de analfabeteco en la tuta lando estis kunvokita de la Eduka Ministerio de la Centra Popola Registaro kaj Tutĉinia Federacio de Laboristoj je la fino de septembro. Ĝin partoprenis 49 kadroj el la koncernaj organizoj. En la kunsido oni diskutis unue la planon de forigado de analfabeteco projektita de k-do Ĉian Zun-ĵuj, eduka vicministro de la Centra Popola Registaro. Poste oni aŭdis raporton pri spertoj de analfabetec-neniigo en la vilaĝo Sijukoŭ en Ŝansi-provinco, faritan de k-do Lin Handa, estro de la Departamento de Edukado de Laboristoj kaj Kampanoj, kaj Planon de Tutlanda Analfabeteco-

neniigo, faritan de k-do Kiang Ling, vicestro de la Departamento de Libertempa Edukado de Laboristoj kaj Kampanoj. Ĉiuj partoprenintoj de la kunsido konsentis ke neniigo de analfabeteco el la laboristoj kaj kampanaj kadroj estas necesa kondiĉo por la tutlanda ekonomia kaj demokratia konstruado. Samtempe oni decidis, ke estu forigita en du jaroj la analfabeteco inter la laboristaj kaj kampanaj kadroj de diversaj organizoj, en tri ĝis kvar jaroj tio inter la industriaj laboristoj, en ses ĝis sep jaroj tio en la junaj kampanoj kaj metiistoj, kaj en dek jaroj, analfabeteco en la tutlando.

KURANTAJ AFEROJ

Grava Sciigo

Nia administracio jam translokigis al 38, Suchow Hutung, Peking, Ĉinio. Niaj perantoj, abonantoj kaj specimen-perantoj de nun vole skribi rekte al la nova adreso por ke ĝi povu vin respondi ĝust-tempe. Ankaŭ la pagon de la abonkotiĝoj ĉu de individuaj legantoj, ĉu de la landaj perantoj, ĉu per mono, ĉu per respondkuponoj, aŭ aliaj eldonaĵoj, oni devas tien sendi.

Sed pri opinioj pri nia bulteno, utiligoj de materialoj publikigitaj sur nia bulteno aŭ aliaj demandoj senrilataj kun la administrado ni petas la legantojn kaj kunlaborantojn daŭre skribi al nia redakcio laŭ la malnova adreso.

El Popola Ĉinio

EL POPOLA ĈINIO

Monata Informa Bulteno eldonata de Fremdlingva Eldonejo

Redakcio: 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio

Administracio: 38, Suchow Hutung, Peking, Ĉinio.

ENHAVO

Bildo sur la kovrilo—La felteaj geknaboj karesas siajn kolombojn.

Alvoko al la Popoloj Tutmondaj de la Paĉkonferenco de la Azia kaj Pacifika Regionoj

Pacifiko Fariĝas Ponto por Unuiĝo inter Popoloj

Bakteria Milito Pruvita de Sciencistoj

Plifirmigu la Amikecon inter Ĉinio kaj Sovetunio

Popola Edukado de Ĉinio

Nova Ĉinio en Bildoj—Granda konferenco por paco; Tien^{an}-Lanĉou-Fervojo; La amikeco de la pornacaj popoloj.

Hejmo de Ordnara Laboristo

Pordego de Ĉielpaco

La Feliceo

PAGU AL NIAJ PERANTOJ

- Aŭstrio :** (1) Steve Bennett, Flat 3, 62 Brighton Av., Croydon Park, N. S. W. (Jarabono 7s. 6p.)
(2) (por abono:) A. Keesing, G. P. O. Box 4886, Sydney.
(3) (por akto:) Current Book Distributors, 40 Market Street, Sydney, NSW.
- Aŭstralio :** Antonio Balague, St.-Pölten, Kirchenweg 12. (Jarabono 20 schilling-oj)
- Belgio :** Walraevens Rajmundo, Rabelais Strato, 10, Bruselo. (Poŝtekkonto: 16, 43, 53) (Jarabono: 50 bfr)
- Britlando :** F-ino F. Paraige, 10 Woronzow Road, St. John's Wood, London, N. W. 8. (Jarabono 6 ang. ŝil)
- Bulgario :** (1) Bulgara Esperantista Kooperativo, Sofia—Str. TRI UŜI, 15. (Jarabono 8 Lv.)
(2) Ivan Kovačev, Sofia, str. "Iv. Bigor" no. 24.
- Ĉeĥoslovakio :** Burda Rudolf, Plzen-palackeho N. Ě. 6. (Jarabono 50 kcs.)
- Danlando :** Hans v. Bindner, Poppelalle 76, Vivu Hareskovby. (Jarabono 6 kronoj)
- Finnlando :** Nillo Kavenius, Niklaksenkatu 10/14, Turku 9. (Jarabono: 300 Fmk.)
- Francio :** Labor-Esperantista Federacio (Jarabono: Fr. F. 450)
- Germanio :** (1) Helmut Löffler, Mittweida/Sachsen, Theaterstrasse 1. (Jarabono: 6 D.M.)
(2) Heinv Knorr, (24) Hamburg-Wellingsbüttel, Ekerkamp 81.
- Hungario :** (1) KULTURA, Budapest, V. Akademia u. 10. (Jarabono 15 forintoj)
(2) Marton Lajos, Bors.-u. 2, Budapest XII, (poŝtkonto 38.187)
- Indonesio :** Kho Khwat Liat, Post Box 115, Surabaya, Java. (Jarabono: 10 Rp.)
- Islando :** Siguldur Gudmundsson, Falkagata 1, Reykjavik. (Jarabono 15 kronoj)
- Italio :** Eduardo Zumbo, Casella postale 226, Torino. (Jarabono: 400 liroj)
- Izzaelio :** Bencion H. Danon, Kibuc Afikim. (Jarabono: 400 prutoj)
(Jarabono 360 jen-oj)
- Japanio :**
- Meksikio :** (kaj aliaj sudamerikaj landoj): Jezuvo Serrano L., Central de Talabarteros 72, Col. E. Carranza, Mexico, D. F. (Jarabono: 5 pesoj)
- Nederlando :** (1) Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen. (Jarabono fl. 3.50)
(2) Esperanto-Grupo Vaals, Pr. Bernhard-str. 4, Vaals.
- Pollando :** Asocio de Esperantistoj en Pollando, Warszawa Marszalkowska 81/32. (Poŝteka konto I-4329/113) (Jarabono 12 zl.)
- Rumanio :** Rumana Esperantista Societo, București I, Bulev. 6 Martie 15. et. I. (Jarabono: 120 leoj)
- Svedio :** Einar Adamson, Värmlandsgatan 18, Göteborg. (Jarabono 5 kronoj)
- Usono :** (Jarabono \$1.25)

Rim:

Legantoj en aliaj landoj novas pagi per respondkuponoj (1 rk. kontraŭ 1 ekz.) aŭ egalvaloraj Esp-aj libroj (sed ne gazetoj). Sennagan specimenon ni sendos al ĉiu kiu letere postulos.